

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

7

1994

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Sur rivero

Foto de LI CHUNGENG

INTER NI

Esperanta ponto

Per gazeto mi povis koni vian vastan landon kaj vian popolon. Mi partoprenis la kongreson de Pekino en 1986, tiel eblis persone vidi

kaj aŭdi interesajn lokojn en Ĉinio. Neniam mi kre-dis vojaĝi al via malproksima lando, sed Esperanto ebligis ĝin.

KORTTU EKMAN
(Finnlando)

Traleĝinte la artikolon “Akupunkturado al poloj” en la numero 7-a 93, mi tre miris, ke eĉ per unu frazo prof. Zhang Anli ne menciis E-tradukadon, kiu okazis dum ŝia kuracado kaj kio povus esti, laŭ mi, interesa por diversnaciaj esperantistoj.

Mi laboras de tri jaroj kun ĉinaj kuracistinoj. Sed la akupunkturado tute ne povus okazi sen nia lingvo Esperanto.

Mi mencias tion por montri al la mondo, kiel utila kaj bezonata estas nia internacia lingvo.

LILIANA PALCZEWSKA
(Pollando)

Mi tre bedaŭras, ke mi longe ne vidas la rubrikon “KORESPONDI DEZIRAS” en via gazeto.

ACUŜI HOŜIDA
(Japanio)

La rubriko “KORESPONDI DEZIRAS” daŭre funkcias. Kiuj volas publikigi la anoncon, bonvolu sendi ĝin al ni kun prezo ne ŝanĝita.

La Red.

ENHAVO

- | | |
|--|--|
| 2 <i>INTER NI</i> | 29 <i>BELA ĈINIO:</i>
Tombo de la Flava Imperiestro sur la Loesa Altebenaĵo |
| 4 Ĉinoj pri familio | 32 Libera elekto de ofico en Ĉinio |
| 6 Intima geedza paro | 36 Arbaro en urbo |
| 8 Enketo pri familia konsumo | 37 <i>EL ĈINAJ GAZETOJ</i> |
| 10 <i>EKONOMIE:</i>
Nova fremdvaluta sistemo en Ĉinio | 38 Por sekureco de la ĉina civila aviado |
| 11 Ĉinio intensigas sian leĝan sistemon | 42 <i>ĈINA KULTURO:</i>
La antikva prozo de Ĉinio |
| 12 <i>VOĈO DE E-ISTOJ:</i>
Esperanto en la scienc-teknika kampo | 44 <i>SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:</i>
Maksimoj de Wei Zheng por ŝtatregado |
| 14 <i>SUR NIA LIBROBRETO:</i>
Lirla roĵo | 44 <i>MEM PROVU</i> |
| 15 Homoj, ne donu morti! | 45 <i>POR VIA SANO</i> |
| 16 <i>POR KOMENCANTOJ:</i>
Li elektis vivon | 45 <i>KORESPONDI DEZIRAS</i> |
| 17 <i>ESP-NOVAĴOJ</i> | 46 Plano por sano de la civitanoj |
| 18 Novaj loĝdomoj de kamparanoj | 48 <i>KURANTAJ AFEROJ</i>

<i>SUR LA KOVRILLO:</i>
Popola azendanco |
| 20 <i>ĈE YANGZI-RIVERO:</i>
Kupra urbo kaj Anqing | |
| 24 En la mondo de Rodin | |
| 26 <i>SUR SCENEJO:</i>
Alilandaj dancoj prezentataj de ĉinoj | |
| 28 Sur la ruino de Niya | |


Foto de Li Chungeng

2 Sur rivero

34 Smeraldo sur dezerto

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Changchun (p. 36)
2. Wuyi-monto (p. 34)
3. Huangling-gubernio (p. 29)
4. Taklimakan-dezerto (p. 28)



Ĉinoj pri familio

LA jaro 1994 estas internacia familia jaro deklarita de UN. Tio multe atentigas pri la universala socia problemo de familio kaj alvokas ĉiujn registarojn, societojn kaj fakulojn zorgi pri altigo de la kvalito de familio kaj ĝia rolo.

Familioj, kiel ĉeloj de la socio, diferencas unu de alia pro malsameco de historiaj fonoj, reĝimoj kaj moroj. Kiel baza ekonomia kaj viva unuo de la socio, la feŭda familia formo aperis en Ĉinio en la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Longan tempon poste aperis tradiciaj ĉinaj familioj, kiuj plejparte havis tri generaciojn kun viroj kiel la centro kaj kies ĉefa funkcio estis reproduktado.

En la moderna tempo, la ĉina geedziĝa kaj familia sistemo radikale ŝanĝiĝis. Memdecida geedziĝo plimultiĝis kaj familia skalo malgrandiĝis. En la urboj trimembra familio kun geedzoj kaj ties solinfano fariĝis la plej multaj. Precipe en la pasintaj dekelkaj jaroj aparte evidentiĝis la ŝanĝiĝo de la geedziĝa kaj familia sistemo: Oni ne tiel zorgis pri la socia pozicio de sia fianĉ(in)o; la viroj kaj virinoj ĝuis pli da memdecidaj rajtoj por geedziĝo kaj pli da egaleco en la familio; la virinoj okupis pli bonan pozicion en la familio; la kvanto de eksedziĝo evidente kreskis kaj la eksedziĝo ne plu estis rigardata kiel malvirtaĵo; plimultiĝis reedziĝintoj kaj

dumvivaj fraŭl(in)o; pligrandiĝis la nombro de neleĝaj geedzoj; la socio pli kaj pli malmulte intervenis en la familion kaj la rajto teni sian konfidencan aferon estis pli kaj pli respektata.

Kun la ŝanĝiĝo de geedziĝaj konceptoj ŝanĝiĝas ankaŭ la familia stato. Unue, la intimeco inter la familianoj malfortiĝas pro la intensiĝo de socia konkurenco. Laŭ tradicio oni rigardis familion kiel "Edenon" plenan de intimeco kaj rifugejon de sentoj. Sed nun la familianoj malfacile interkompreniĝas kaj havas en si grandan muron pro psika premo kaŭzita de la intensa socia konkurenco. Iuj eĉ rigardas la familion kiel lokon por elverŝi sian koleron. Due, la

geedziĝa ligilo pli kaj pli malstreĉiĝas pro intensiĝo de memdecida koncepto. Kun la disvolviĝo de ekonomio, la familianoj emfazas valoron de sia memo kaj strebas al sia propra individueco, tial la dependeco inter ili pli kaj pli malfortiĝas. Trie, la ekonomie interhelpa funkcio de la familio ŝanĝiĝas pro la mon-efekto de merkata ekonomio. Antaŭe la geedzoj estis rigardataj kiel ekonomia unio, kion nun anstataŭis tute nova rilato de geedzoj en ekonomio. Ekz., en la pasintaj kelkaj jaroj oni faris notariadon de riĉaĵo antaŭ geedziĝo, por ke la posedaĵoj de la edzo kaj la edzino ne miksiĝu unu kun la alia; la edzino rajtis havi sian privatan monon kaj la edzo kaŝitan kason, tio montris, ke la

Festado de la naskiĝtago de avo




geedzoj ĝuis relativan sendependecon en ekonomio.

Malgraŭ la ŝanĝigoj supre menciitaj, la ĉinaj familioj ankorau konservas multon de la tradiciaj. Ekz., vivtenado al la maljunuloj, intimito inter la familio, forta devokonscio por la familio, zorgado pri kulturado de familiaj disciplinoj kaj emfazo de harmonia kunvivado de la familio.

La moderna ĉina familio havas funkcion de nasko, konsumo, vivteno al maljunuloj, edukado al infanoj, produktado kaj spirita vivo. Inter ili la plej grava karakterizaĵo estas vivtenado al maljunuloj garantiata de la leĝo. La gefiloj havas la devon vivteni siajn gepatrojn ekonomie kaj prizorgi ilin spirite. Kun la disvolviĝo de produktaj fortoj, premiuma asekuro por maljunuloj praktikata en iuj vilaĝoj disvastiĝas tago post tago kaj la socia asekuro por urbanoj pli bone funkcias. En la proksima estonteco la vivtenado far la gefiloj al la gepatroj estos anstataŭigita per tio, ke la gefiloj prizorgos la gepatrojn plejparte en spirito kaj ĉiutaga vivo. La vivtenado al maljunuloj estos heredita kiel respektinda virto, absolute ne nur kiel devo. Sed nun en la kamparo la vivtenado antaŭ ĉio signifas tiun ekonomian.

Ĉinaj familiaj tradicioj efektive havas siajn pozitivajn flankojn, sed oni ne devas neglekti la negativajn. Patriarkeco, interveno en la geedziĝan aferon de gefiloj kaj penado por akiri privatajn interesojn por la gefiloj iagrade troviĝas en la nunaj ĉinaj familioj. En la kamparo ofte okazas, ke la gepatroj intervenas en la geedziĝan aferon de siaj gefiloj. Koncerna departemento faris enketon inter vilaĝoj de 14 provincoj kaj municipoj kaj trovis, ke pliparto de virinoj ĝuas nur duonmemdecidon pri sia edziniĝo kaj necesas sufiĉe



Provfotado

longa tempo por realigi plene memdecidan edziniĝon. Ili preferas bonan ekonomian staton al konduto, kapablo, intereso kaj aĝo de sia fianĉo. Ĉio ĉi tio estas zorgata de la tuta socio.

Kia estos ĉina familio post kiam venos la 21-a jarcento? Fakuloj analizis, ke ĝi baziĝos sur pura amo kaj komuna intereso. Kiam pliboniĝos materia vivo, oni donos pli da atento al spirita vivo. La tendenco de ekonomia faktoro kaj mamoniismo, kiuj nebone influas la geedziĝon kaj familion, pli kaj pli malfortiĝos.

Post kiam venos la dua generacio de solinfanoj en la komenco de la 21-a jarcento, tra la tuta Ĉinio troviĝos familioj el geavoj, gepatroj kaj solinfano, kun la lasta kiel la kerno de la familio. Bonkvalita familia edukado tre gravos por la solinfano, kiu ne devos esti dorlotita, soleca kaj arbitra, kaj rekte rilatos al la estonteco de la ĉina nacio.

Tiam la geedzoj kulturos en si amon por garantii intiman rilaton kaj feliĉan vivon. Sed eksedziĝa libereco certe ŝanĝos la tradician koncepton kunvivi dum tuta vivo. Ne estos facile fariĝi ideala paro por geedzoj dum lon-

ga vivdaŭro. Tial pli ofte okazos eksedziĝo kaj reedziĝo, el kio rezultos la komplikeco de la familianaj rilatoj.

Iuj junuloj provas amon ekster geedziĝo, rigardante tion kiel rimedon ekvilibrigi amsentojn aŭ aldonon al geedziĝo. Tio ne povas ne malhelpi la harmonion de geedziĝo. Pro la altiĝo de homa naturo kaj plua strebo al feliĉo multaj preferos eksedziĝon kaj reedziĝon al amo, kiam aperos geedziĝa krizo ekster geedziĝo.

Ĉinoj iom post iom sin liberigas de la tradicia diro, ke malhavo de filo estas la plej malfeliĉa. Pli da junuloj opinias, ke kariero kaj amo pli gravas, kaj ili ne volas esti ŝarĝitaj per flegado de infano. Nun en Ĉinio jam aperis aroj da dumembraj familioj. Laŭ statistiko, de 1978 ĝis 1993 la nombro de naskivaj familioj, kiuj ne volis havi infanon, jam superis milionon.

Kiel ŝanĝiĝas kaj ŝanĝiĝos konceptoj de familio kaj geedziĝo, de familiaj strukturo kaj funkcio kaj de valoro, la kreskanta kvanto de eksedziĝo kaj reedziĝo klare montras al ni, ke la familia vivo restas la unua elekto por ĉinoj. ■

Intima geedza paro

EN la lastaj jaroj en la rondo de ĉinaj intelektuloj ofte aŭdiĝas la nomo Xu Chengbei, kiu verkis sinsekve 10 librojn en 5 jaroj post 1988, kiam eldoniĝis lia faka verko "100 Demandoj pri pekina opero". La kampo, al kiu li sin dediĉas, estas tiu de pekina opero, kiu sin trovas en depresio nun en Ĉinio. Lia edzino s-ino Ye Zhishan iam publikigis sian unuan verkon "Silenta Ora Jubileo de Geedzoj" kaj faris sensacion en la literatura rondo.

Xu kaj Ye, tiu geedza paro, helpas unu la alian, kune progresas en la karieroj kaj amas unu la alian.

Antaŭ 20 jaroj ili konatiĝis

en kunveno, kaj post tio ili disigis kaj laboris en du malsamaj lokoj. Dank' al la bonŝanco ili geedziĝis post 9 monatoj. Kvankam ili vivis en du malsamaj lokoj, tamen amo strikte ligis ilin.

Kelkajn jarojn poste, ili ambaŭ revenis Pekinon. Tiam s-ro Xu laboris kiel dramisto en la Ĉina Teatro de Pekina Opero kaj havis sufiĉe da tempo por sin okupi pri sia ŝatata verkado, dum s-ino Ye laboris en instituto en antaŭurbo, malproksima al la hejmo. Ĉiutage ŝi forlasis sian hejmon frumatene kaj revenis vespere. Kvankam ili povis vivi kaj labori samkiel multaj geedzoj, sed s-ro Xu ne volis daŭrigi tian situacion. Li volis helpi ŝin, por ke ŝi laboru

kune kun li en la urbaj kvartaloj. Li opiniis, ke la geedzoj devas ne nur vivi kune, sed ankaŭ havi samajn hobiajn kaj estas samnivelaj en la intelekto, ĉar granda diferenco inter geedzoj estas malbona. Tion pruvis la faktoj pri eksedziĝo de iuj famuloj kaj malfeliĉo de iliaj edzinoj.

S-ro Xu diris, ke li ne volas suferi tiun malfeliĉon. Por eviti ĝin, li faris grandan penadon ne nur por sia propra kariero, sed ankaŭ por tiu de sia edzino.

Aŭtune de 1986, la tuta familio de s-ro Xu festis la oran jubileon de la geedziĝo de liaj gepatroj, kiuj diligente laboris kiel ĵurnalistoj. Sed en 1957 politika maljustaĵo atakis ilin kaj dum la sekvaj 20 jaroj ili

La geedzoj



La familio de Xu Chengbei



multe suferis kaj anime kaj fizike. Hodiaŭ, kvankam la koŝmaro jam pasis, tamen la natura eleganteco kaj juneco forlasis ilin por ĉiam. Kortuŝita de tio, s-ino Ye, ilia bofilino, verkis per filina amo por la gemaljunuloj artikolon "Silenta Ora Jubileo de Geedzoj".

Kiam ŝi finis sian artikolon, s-ro Xu poluris la lingvon kaj rekomendis la verkon al la redakcio de "Renmin Ribao", la plej multe legata ĵurnalo de Ĉinio. Respondeculo de literatura kaj arta sekcio de la redakcio, kiu akceptis lin, estis kortuŝita ĝis larmoj de la artikolo. Kaj post nelonge oni publikigis ĝin en la ĵurnalo. Koncerne tion, s-ro Xu diris, ke la nivelo de ŝia artikolo estas kompare alta. Ĝi montris ŝian veran sentimenton. Sed se ŝia artikolo ne publikigus, ŝi ne tiel rapide surirus sur la vojon de literaturo.

S-ro Xu dediĉis grandan energion por poluri la artikolojn de sia edzino kaj dank' al lia penado, ŝi povis labori en redakcio de iu gazeto sidanta en la urba kvartalo. La laboro donis al ŝi ŝancon kontakti

kun multaj fakuloj. Tio estas utila ne nur al ŝi en akumulo de literaturaj materialoj, sed ankaŭ en ŝia memkulturado.

Dum helpo al sia edzino en verkado, s-ro Xu mem rikoltis grandan sukceson en sia faka laboro. La libro "100 Demandoj pri Pekina Opero" per facila lingvo, humura stilo kaj anekdotoj sisteme konigis al la legantoj fundamentajn sciojn pri la pekina opero. Li verkis en la sama stilo multajn eseojn kaj eldonis la kolekton titolitan "Panoramo de Teatroj" kaj fine de 1991 li sinsekve eldonis libron "Mei Lanfang kaj la 20-a jc." (Mei Lanfang estis mondfama stelo de pekina opero) kaj aliajn 2 fakajn verkojn pri la teorio de pekina opero, kiuj faris nemalgrandan sensacion en la rondoj teatra, eldonista kaj literaturista. Krome li verkis por fama operisto scenaron "Wu Zetian", kiu ensceniĝis tiutempe. Ĝis tiam en la studa kampo s-ro Xu energie konstruis sian propran teorion sistemon de pekina opero kaj farigis fame konata en arta kaj literatura rondo.

Samkiel aliaj geedzoj de

Ĉinio, ankaŭ Xu kaj Ye devas klopodi por familiaj bagateloj, zorgi pri gepatroj kaj flegi infanon. S-ro Xu volonte sin ŝarĝis per aĉetado kaj aliaj pezaj fizikaj laboroj en la hejmo. La semajnofinon kaj festotagon ili pasigas en la gepatra domo, alportante al ili ĝojon kaj konsolon. Tiukampe s-ino Ye faris pli da klopodoj kaj elverŝis pli da amo. En 1992, blindiĝis ŝia patrino. Ĉiutage ŝi hastis al sia patrino por prepari manĝaĵon por ŝi kaj vespere vizitis la malsanan bopatron.


Malgraŭ ĉio ĉi, ili ne forgesis senĉese altigi labornivelon. Post "Silenta Ora Jubileo de Geedzoj", s-ino Ye publikigis prozojn. Tiusfere ŝi devas pli multe penadi por atingi pli altan celon.

La filino estas profunde influata de ili kaj multe lernis de ili en la ĉiutaga vivo.

Ĉiuj iliaj amikoj admiras tiun familion solidan kaj feliĉan. Ili scias, ke la feliĉo baziĝas ne nur sur ilia sincereco por la vivo kaj laboro, sed ankaŭ sur ilia kompreno racia kaj justa pri la kariero kaj familio.

■

Prezentado de pekina opero



Enketo pri familia konsumo

LASTATEMPE du semajnaj revuoj faris enketon pri konsumo tendenco de 100 familioj de Pekino en 1994. El la validaj enketiloj oni rimarkis, ke multaj altklasaj kaj relative altklasaj varoj vidiĝas en ordinaraj familioj.

Nun ni rigardu de kelkaj flankoj ŝanĝiĝojn en la ekonomia vivo.

HEJMAJ ELEKTRAJ APARATOJ: En la 90-aj jaroj la ordinaraj elektraj aparatoj, t.e. televidilo, fridujo kaj lavmaŝino, estos anstataŭigitaj per pli avangardaj larĝekrana televidilo, aŭtomata lavmaŝino kaj triporda fridujo, kiujn aĉetos multaj familioj en

1994. La enketo diras, ke 15 novtipaj lavmaŝinoj laboros en la prienketitaj familioj, kaj 16% de ili planas aĉeti fridujon grandkapacitan kaj plurfunkcian. Krome, 15 el la 33 prienketitaj familioj, kiuj deziras aĉeti kolorajn televidilojn, aĉetos la altklasan, larĝekranan. Tiu tendenco en la konsumado eble estas ĝojiga informo por reformi la produktajn liniojn de koloraj televidiloj, pli ol duono el kiuj estas flankenlasitaj. Samtempe kun tio, videoregistraro, videoaparato, klimatizilo kaj moderna kuireja aparato estos aĉetitaj de iuj ordinaraj familioj.


PRIVATAJ KOMUNIKILOJ: La enketo montras, ke instalo de hejmaj telefonoj jam fariĝis urĝa

bezono por multaj. 44% de la familioj deziras komunikiĝi kun aliaj sen eldomiĝi. Iuj privataj entreprenistoj volas aĉeti portatan telefonon. 7 el la 15 prienketitoj, kiuj volas aĉeti radio-vokilon, estas administrantoj de ŝtataj entreprenoj, kaj la aliaj estas privataj entreprenistoj.

PRIVATAJ AŬTOJ: Inter la 7 prienketitoj, kiuj volas aĉeti person-aŭton, estas privata entreprenisto, sciencisto, teknikisto kaj lernanto. 6 familioj volas aĉeti kamionon.

PRIVATAJ LOĜDOMOJ: 32% de la prienketitaj familioj aĉetos ŝtatan loĝdomon en 1994 je favora prezo decidita de la ŝtato. En tiu jaro ili unuafoje havos sian

Grandaj koloraj televidiloj plaĉas al klientoj.



propran loĝejon; kaj 10% de la prienketitaj familioj aĉetos komercan loĝdomon je prezo multe pli alta ol la supre menciita.

MEBLOJ: Nun havigi al si novajn meblojn bone spegulas ŝanĝigon de la koncepto pri familia konsumo. Precipe por mezaĝuloj kaj maljunuloj estas malfacile sin liberigi el senŝanĝa tradicia koncepto. En 1994 61% de la prienketitaj familioj volas aĉeti novajn meblojn. 3% el ili volas aĉeti malkarajn meblojn, 73% — mezklasajn kaj 15% — altklasajn. Laŭ la freŝdata kurzo la prezo por importita meblaro estas 85 000 juanoj, tiu por altklasa meblaro farita de Ĉinio — 33 000 juanoj kaj tiu de la mezklasa — 7 500 juanoj.

VESTOJ: Inter la prienketitoj la procentoj de konsumantoj por mez- kaj altklasaj vestoj kaj tiuj por la ordinaraĵoj estas 50% kontraŭ 50%, 13% el la prienketitoj volas havigi al si peltan veston en vintro de 1994. Tio signifas, ke la vestoj en valoro de 1 000 juanoj vendataj en supermerkato kaj tiuj en valoro de malpli ol 100 juanoj vendataj en privataj budoj ambaŭ havas duonon de la klientaro.

KORPOSANIGO KAJ SAN-PROTEKTO: Pli kaj pli multaj konsciigis, ke “sano estas la plej valora riĉaĵo”. En la lastaj jaroj diversaj korposanigaj instrumentoj ekaperis en hejmo. 26% de la prienketitaj familioj esprimis, ke ili faros korposanigan ekzercadon hejme en 1994. Por tio ili elspezos mil kaj eĉ dekmil juanojn. 21% de la prienketitaj familioj elspezos por tonikaj medikamentoj ĉijare.

TURISMO: Paro da junaj geedzoj respondis en la enketilo, ke ili ĉiujare aranĝas 1-2 vojaĝojn. Oni diras, ke nun ne nur gejunuloj vojaĝas por pasigi feriojn kaj mielmonaton, sed ankaŭ pli kaj pli multaj emeritaj maljunuloj rigardas turismon kiel la gravan enhavon en sia vivo. 31% de la prienketitaj familioj ne domaĝas elspezi por turismo.

Estas malsamaj la konsumtendencoj por malsamaĝaj homoj. Laŭ la enketo, la familio el 20-29-jaraj junuloj okupas la unuan lokon en la konsumado. La enketo montras, ke dekonon de la prienketitaj familioj elspezos ĉiu pli ol dekmil juanojn por edz(in)i-

ĝo en 1994. Iu elspezis 40 000 juanojn por sia edziĝo. La ĉina socio estas en transformiĝo kaj disvolviĝo, sekve la familioj de tiuj aĝoj estas plej sentemaj pri tio kaj strebas al alta vivnivelo. La enketo montras, ke la elspezo de tiuj familioj estos granda por multaj objektoj, i.a. 31% de la familioj el junaj geedzoj havas malfacilon por aĉeti loĝdomon. Tiuj, kiuj ricevis laboron antaŭ nelonge, sendube bezonas helpon de siaj gepatroj en la konsumado.

46% de la 122 prienketitaj familioj konsistas el la geedzoj 30-45-jaraj, nome kernaj familioj. Estas stabilaj iliaj familia konsisto, vivstato kaj enspezo. Membroj de tiuj familioj estas la ĉefaj konsumantoj de la socio kaj devas plenumi la taskon zorgi pri la familia vivo. Krome, 47% de la familioj havas problemon pri edukado de infanoj kaj 58% de la kernaj familioj devas elspezi nemalgrandan monsumon por edukado de infanoj. Dume, iuj el ili devas elspezi por mem lerni fakajn teknikojn, por adaptiĝi al la bezono de la ekonomia disvolviĝo. Iu el la prienketitoj volas elspezi por lerni manipulado de komputoro. 40% el la prienketitoj esprimis, ke ili alprenos diversajn rimedojn por akiri novajn sciojn kun celo altigi sian vivipovon, i.a. la kernaj familioj okupas certan proporcion.

Estas simpla la konsumado de la familio el gemaljunuloj.

La enketo montras, ke 57% de la prienketitaj familioj ĉiumonate enspezas malpli ol 1 000 juanojn kaj nur 7% de ili — pli ol 3 000 juanojn. Nemalmultaj prienketitoj rifuzis malkaŝi sian deponaĵon. Multaj familioj per sia ŝparita mono aĉetis obligaciojn kaj akciojn. Ankaŭ iuj volas per sia ŝparita mono fari negocon pri antikvaĵoj. Ili opinias, ke kun la ekonomia disvolviĝo kaj leviĝo de la popola vivo, ankaŭ la antikvaĵa merkato vigliĝos kiel la bona merkato. ■

Knabinoj ŝatas luksajn kosmetikaĵojn.



Nova fremdvaluta sistemo en Ĉinio

de LI PING

LA unuan de januaro ĉi-jare, Ĉinio ekpraktikis novan fremdvalutan sistemon, t.e. unuigi tarifojn kaj starigi simplan kaj flosantan tarifon surbaze de merkata oferto kaj bezono, por fine efektiviĝi liberan interŝanĝon de la ĉina mono *Renminbi* (Ĵenminbi).

Antaŭ tio, en Ĉinio kunekzistis oficiala tarifo de *Renminbi* kaj tiu de la fremdvaluta reguliga merkato. Ekz., laŭ la oficiala tarifo unu usona dolaro ekvivalentis ĉ. 5.8 ĉinajn juanojn, kaj laŭ la tarifo de la reguliga merkato unu usona dolaro ekvivalentis ĉ. 8.7 ĉinajn juanojn. Kun praktiko de la ĉina merkata ekonomia sistemo kaj kresko de la ekstera komerco, tiu ĉi sistemo de tarifo montris pli kaj pli multajn mankojn. Samtempe, laŭ la difinoj pri la rimosa aranĝo inter membro-lando kaj kontraktanto far la Internacia Mona Fonduso kaj la Ĝenerala Konvencio pri Tarifoj kaj Komerco, Ĉinio devas praktiki tarifo-sistemon, pli proksiman al tiu sur la internacia merkato, por faciligi al si restarigon de la pozicio de Ĉinio kiel lando subskribinta la Ĝeneralan Konvencion pri Tarifoj kaj Komerco. Aliflanke, dank' al la 16-jara praktiko de reformado kaj pordomalfermo, la ĉina ekonomio kontinue kaj stabile disvolviĝas kaj la centra banko jam havas sufiĉan forton por stabiligi merkatajn tarifojn. Ĝuste sub tiu cirkonstancaro la ĉina registaro komencis reformadon de fremdvaluta sistemo, kun tarifo-unuigo kiel la ĉefa.

La karakterizaĵo de la nova tarifo-sistemo estas, ke la rilato inter oferto kaj bezono sur la fremdvaluta merkato estas la ĉefa bazo por determini tarifojn. La unuan de januaro 1994 la Ĉina Popola Banko publikigis tarifojn de *Renminbi* surbaze de la interŝanĝa prezaro sur la fremdvaluta merkato praktikata la 31-an de decembro 1993, referencante la tarifovariadon de la ĉefaj monbiletoj sur la internacia merkato.

Tuj ĉe la komenco de la nuna jaro la Ŝtata Fremdvaluta Administracio de Ĉinio publikigis la

unuan merkatan valut-tarifon: per 867.83 ĉinaj juanoj oni povas aĉeti 100 usonajn dolarojn kaj vendi ilin kontraŭ 872.17 ĉinaj juanoj. Sur la fremdvaluta reguliga merkato de Ŝanhajo, en la unua tago de interŝanĝo ĝi estis farita ĉiam laŭ la sama kurzo de 8.7 ĉinaj juanoj por unu usona dolaro, la transakcia valoro atingis 16.64 milionojn da usonaj dolaroj. La rezulto markis la stabilan unuigon de la duobla tarifo longtempe ekzistanta en Ĉinio.

La fremdvaluta sistemo enhavas ankaŭ la jenon: efektiviĝi aĉeta-vendan sistemon de valuto, likvidi la sistemon pri fremdvaluta rezervo, kvoto-regado kaj donado al la supera aŭtoritato; starigi fremdvalutan borson inter bankoj kaj plibonigi tarifan mekanismon; malpermesi al fremda valuto cirkuli interne de Ĉinio; forigi instrukcian planon de enspezo kaj elspezo de fremda valuto; kaj ke la ŝtato devas efektiviĝi makroreguligon pri la fremda valuto kaj internaciaj enspezo kaj elspezo ĉefe per ekonomiaj kaj juraj rimedoj.

La nova fremdvaluta sistemo donas al la ĉinaj entreprenoj pli da libero de uzado de fremda valuto. Ili povas interŝanĝi fremdan valuton per *Renminbi*, kun valida atestilo. Tamen, tio signifas, ke la entreprenoj riskos preni sur sin la danĝeron de fremdvaluta flosado. Tiam ĉiuj entreprenoj konkuros inter si sur unu sama startlinio.

Por alilandaj entreprenistoj la nova fremdvaluta sistemo alportos profiton pli grandan ol perdo. Antaŭe, por fari investon en Ĉinio, alilandaj entreprenistoj devis ŝanĝi la valoron de la investaĵo laŭ la oficiala kurzo, sed ricevi profiton laŭ la reguliga kurzo. Tio evidente damaĝis la interesojn de alilandaj entreprenistoj. La nuna unuigita kurzo povus kaŭzi iajn ekonomiajn perdojn al alilandaj entreprenistoj en mallonga tempo, tamen ili profitos, laŭ malproksima vidpunkto. Aliflanke, antaŭe la importita kapitalo estis kalkulata laŭ la oficiala kurzo, kio kaŭzis perdon al alilandaj investantoj, sekve, multaj alilandaj entreprenistoj postulis solvi la problemon de valuto-bezono interne de Ĉinio, kaj ankaŭ diversaj lokaj organizoj prenis tion kiel politikon favoran por allogi alilandajn investantojn. El tio rezultis, ke la bankoj ankoraŭ devis kontentigi la bezonon de alilandaj entreprenistoj pri fremda valuto, kiu eĉ ne sufiĉis por la konstruado de Ĉinio mem. Nun la stato plibonigis kaj la bankoj estas liberigitaj el tio. Normigo kaj internaciigo de fremdvaluta regado nepre pligrandigos la investadon de alilandaj entreprenistoj. Oni antaŭdiris, ke en 1994 aperos nova entuziasmo por investado.

Unu el la gravaj taskoj por tiu ĉi reformado estas starigi unuigitan kaj normigitan merkaton de fremda valuto. Kompare kun la ekzistanta reguliga merkato de fremda valuto, tiu merkato havas jenajn karakterizaĵojn: Unue, ĝi estas negoca merkato de fremda valuto inter bankoj, kaj la fremdvalutaj bankoj estas


(Daŭrigo sur p. 16)

Ĉinio intensigas sian leĝan sistemon

NUNTEMPE Ĉinio en moderniga konstruo transiras de la planizita ekonomio al la merkata. Sub la antaŭa sistemo de planizita ekonomio Ĉinio praktikis alte koncentritan kaj unuigitan administradon kaj tiam la leĝoj ne protektis merkatan interŝanĝon. Tiel, kiam ekonomia sistemo ŝanĝiĝas, neeviteble aperis la situacio, en kiu kunekzistas novaj kaj malnovaj konceptoj kaj leĝoj, multaj novaj problemoj kaj konfliktoj.

Ekz., ofte okazas ekonomiaj konfliktoj koncerne la interesojn kaj poziciojn inter diversaj departementoj, regionoj kaj entreprenoj. Kvankam la sinteza profito de industrio en 1993 multe altiĝis kompare kun tiu en 1992, tamen scienca progreso ludis nur malgrandan rolon en nove kreskinta produktovaloro, la proporcio de investo kaj produkto de multaj projektoj estis apenaŭ 1:1.5. Tiu fenomeno manifestis de iu flanko, ke mankas al la praktiko de nuna merkata ekonomio kompletaj kaj fortaj detenaj kondiĉoj. En la kampoj de socia ordo, medioprotekto, terluigo k.a. povas aperi ankaŭ similaj problemoj kaj konfliktoj.

Pro tiu situacio, necesas intensigi leĝan sistemon, akceli leĝfaradon kaj iom post iom perfektigi



Diskuto pri leĝa sistemo

nunajn leĝojn por defendi la normalan ordon de socialisma merkata ekonomio. La Ĉina Popola Kongreso, la plej alta aŭtoritato de la ŝtato, sin ŝarĝas per grava tasko — doni leĝojn. La Oka Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio decidis meti en la plej gravan lokon la ellaboron de ekonomiaj leĝoj, por formi leĝsistemon de socialisma merkata ekonomio.

En la Dua Plena Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio okazinta en Pekino marte de 1994 kun la temo pri reformado, disvolviĝo kaj stabileco, la ĉeestantoj varme diskutis pri la konstruo de socialisma leĝsistemo kaj akiris komunan kom-

prenon, ke la konstruo kaj perfektigo de socialisma merkata ekonomio bezonas la protekton pere de kompleta leĝsistemo; diversnivelaĵoj registaroj kaj iliaj oficistoj devas per leĝa rimedo administri ekonomion kaj socion kaj defendi la aŭtoritatecon de la leĝoj. En 1994 oni devas ellabori administrajn regulojn, doni grandan atenton al plenumo de leĝoj, disvolvi leĝservajn instituciojn, kulturi tiajn talentulojn kaj intensigi la koncepton pri leĝa sistemo en la tuta socio.

Oni raportis en la kunveno, ke post la unua sesio en 1993, Ĉinio evidente plirapidigis siajn paŝojn en leĝfarado. La Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola

Esperanto en la scienc-teknika kampo

de SHEN CHENGRU*

LA nuna jaro koincidas kun la dekjarigo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio Sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. S-ro Li Zhensheng (Li Ĝenseng), eksvicprezidanto de la

Ĉina Akademio de Sciencoj kaj fakulo de tritiko-kulturado, skribis: "Lernu Esperanton kaj vaste kontaktigu". La vortoj trafe esprimis la dekjaran laboron de la asocio kaj montris al ni la estontecon.

En la dek jaroj la asocio trairis vojon malfacilan kaj zigzagan, sed kuraĝigan kaj fruktodonan. Ni strikte sekvis la politikon: Lernado de Esperanto celas aplikadon kaj aplikado estas plej efika lernado. Tion, ke nia asocio

Kongreso de Ĉinio aprobis kaj reviziis entute 21 leĝojn kaj koncernajn decidojn, el kiuj 13 koncernas la merkatan ekonomion, inkl. leĝojn pri kompanio, agrikulturo, protekto de rajtoj kaj interesoj de konsumantoj, scienc-teknika progreso, instruistoj, ekonomiaj kontraktoj (revizii-taj), kaj leĝojn kontraŭ maljusta konkurenco kaj aliajn gravajn leĝojn. La komitato sankciis ankaŭ 17 paktojn kaj konvenciojn, kiujn Ĉinio kontraktis kun aliaj landoj.

1994 estas la jaro, en kiu Ĉinio alprenis multajn rimedojn por reformado. La cirkonstancoj bezonas, ke la leĝoj gvidu, aktivigu kaj protektu la reformadon, akcelu la leĝofaradon, precipe faradon pri ekonomiaj leĝoj. La sesio aprobis budĝetan leĝon de la Ĉina Popola Respubliko konsistantan el 11 ĉapitroj kun 79 artikoloj pri budĝetaj strukturo, inspektado, kontrolado, sankcio, aplikado kaj reguligado, fina

kalkulo, orbito de en- kaj elspezoj, leĝaj devoj, administraj funkcioj, povoj, k.a.

La sesio rajtigis leĝofaradon al Xiamen (Ŝjamen), ĉefurbo de Fujian(Fuĝjan)-provinco, ĉe sudorienta marbordo de Ĉinio. Tial Xiamen fariĝis la tria speciala ekonomia distrikto, post la urbo Shenzhen kaj Hainan-provinco en suda Ĉinio. La ekonomia disvolviĝo de Xiamen bezonas tiun rajton. Ĉinio aprobis, ke Xiamen, unu el la specialaj ekonomiaj distriktoj, rajtas praktiki politikojn de libera haveno kaj sintezan reformadon de ekonomia sistemo de la urbo. Trans maro Xiamen najbaras al Taiwan, la loĝantoj de tiuj du lokoj parolas la saman lingvon, havas similan moron kaj multaj el ili parenkas unu kun alia. Pro ĉio ĉi Xiamen estas grava loko por akceli la kontakton kun Taiwan-anoj, la ekonomian cirkulon kaj kulturan interŝanĝon kun Taiwan. Ĝi ludos gravan ro-

lon en la korespondado, navigacio kaj komerco inter la ĉina ĉeftero kaj Taiwan, kaj fine en unuigo de la ĉina nacio.

En la sesio oni multe parolis pri praktikado de la leĝoj. Rememorante la plenumadon de diversaj reformaj rimedoj kaj leĝoj aprobitaj pasintjare, la ĉeestantoj opiniis, ke malfacila estas tio, ke la socio restas stabila en tiu periodo, kiam doniĝis tiel multe da leĝoj, tio signifas, ke tiuj rimedoj kaj leĝoj defendas la popolajn interesojn, kaj pro tio la tuta socio aprobas kaj observas ilin.

Samtempe kun tio pluraj ĉeestantoj diris, ke iuj leĝoj ne evidente efikas pro manko de propagando kaj preparado, ekz., la Leĝo pri Instruistoj oficiale praktikata ekde la 1-a de januaro 1994 ne vekis grandan eĥon en la socio nek en eduka rondo. Tial la ĉeestantoj unuvoĉe alvokis intensigi inspektadon kaj kontroladon por garantii la efektivigon de leĝoj, dekretoj kaj diversaj rimedoj. ■



La aŭtoro (la dua de maldekstre) en la Eŭropa Filma Kompanio AGFA

havas amikojn tra la mondo, ni ŝuldas ĝuste al la lernado kaj aplikado.

Konsilantoj de la asocio kaj iuj famaj sciencistoj skribis al gvidantoj de la akademio, proponante: "Disvastigu Esperanton inter sciencistoj kaj faru internacian interŝanĝon en scienco kaj tekniko por servi nian lingvon al la ekonomia konstruado kaj monda paco." La gvidantoj donis instrukcion, ke la sciencistoj lernu Esperanton por internacia interŝanĝo en scienco kaj tekniko.

Lernado celas aplikadon kaj aplikado interŝanĝon. Tio prosperigas ne nur sciencan, sed ankaŭ Esperanton.

Sciencistoj de la asocio opinias nian lingvon utila kaj vaste uzas ĝin. Kiel ekzemple, korespondi kun alilandaj esperantistoj, viziti aliajn landojn, partopreni en seminario, interparoli pri komuna komprenaĵo, aperigi artikolojn en revuoj, interŝanĝi materialojn, komuniki informojn pri scienc-esplora laboro, akceli teknikan transdonadon kaj fari scienc-teknikan komercon. La sukceson ni jam informis en la revuo "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", organo de la asocio.

Ni estas konvinkitaj, ke la disvolviĝo de Esperanto dependas de aplikado kaj ankaŭ ĝi povas kontribui al la scienc-teknika disvolviĝo.

Pere de nia revuo kaj Esperanta kongreso okazigata de la akademio en ĉiu dua jaro, sciencistoj ĉinaj kaj alilandaj povas fari amikan kontaktiĝon kaj interŝanĝon de novaj nocioj, pensoj kaj metodoj pri scienco kaj tekniko, por kontribui al progresigo de scienco kaj tekniko kaj al ekonomia disvolvo. Se ni bone laboros, ni memfide respondos la jenon.

"Ĉu Esperanto estas utila?" La respondo estas jesa. Ĝi estas utila, se vi lernas kaj uzas ĝin senĉese. Tio signifas, ke vi lernas ĝin ne vane kaj ĝi rekompencos vin.

"Ĉu mi havos samprofesiojn, se mi lernas Esperanton?" Ankaŭ la respondo estas jesa. Sed vi devas serĉi ilin en la uzado. Multaj alilandaj sciencistoj konatiĝas kun siaj samprofesioj en amika kontaktiĝo kaj lernas unu de alia.

"Ĉu Esperanto povus plene esprimi la leksikonon de mia profesio?" Sendube. Origine iuj vortoj ne troveblis en Esperanto, sed nun ili estas konsistiga parto de la lingvo kaj preskaŭ ĉiuj terminoj esprimiĝas en Esperanto. Esperanto estas kombinaĵo de la komunaĵo de pluraj lingvoj, tial ĝi povas interkomunikigi homojn, kiuj parolas malsamajn lingvojn.

"Mi maljuniĝas, ĉu mi povus baldaŭ ellerni kaj apliki ĝin?"

Timo ne necesas. Iu sciencisto lernis nian lingvon en postlaboraj horoj kaj metis bazon por uzi ĝin. Nun li havas la kapablon kompili terminaron, verki artikolon kaj poluri kontribuojn. Iu sciencisto eklernis Esperanton en la aĝo de pli ol 50 jaroj. Li persiste ĝin lernis 10 jarojn kaj nun jam kapablas aŭskulti, paroli, legi, skribi kaj traduki. Ĉu junaj, ĉu maljunaj, ĉiuj povas atingi sian celon, se ili diligente lernas ĝin.

"Ĉu estas fakmaterialoj por legi?" Kompreneble. En nia revuo kaj multaj alilandaj revuoj aperas fakaj artikoloj aŭ informoj, tamen la nombro devas esti pli granda por kontentigi la bezonon.

Nun mi finu mian artikolon per la surskribo farita de s-ro Lu Jiaxi (Lu Ĝjaŝji), honora prezidanto de la asocio kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, okaze de la dekjarigo de la asocio. Ĝi legiĝas jene:

"Intensigi lernadon kaj propagandon de Esperanto,

Kontribui al la paco kaj progreso de la homaro!" ■

* La aŭtoro estas vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj ĉefredaktoro de la revuo "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj".

Nekrologo

Profesoro Chu Tunan, prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", vicprezidanto de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj honora prezidanto de la Centra Komitato de la Ĉina Demokrata Ligo, forpasis en Pekino la 11-an de aprilo 1994, en la aĝo de 95 jaroj.

Chu Tunan naskiĝis en 1899. Li esperantistiĝis en 1919 en Pekino. Dum pli ol 70 jaroj li dediĉis multe da tempo kaj energio al diskonigo de Esperanto en Ĉinio. Li alte taksis la valoron de Esperanto kaj la noblan idealon de D-ro Zamenhof kaj pledis por uzi nian lingvon en UN. En 1981 li kun aliaj eminentuloj iniciatis inter ĉinaj parlamentanoj kaj eminentuloj la societon "Amikoj de Esperanto" kaj estis elektita kiel ĝia prezidanto. Li estis ankaŭ vicprezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK. Lia forpaso estas granda perdo por nia Esperantujo.

Societo "Amikoj de Esperanto"
Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de El Popola Ĉinio



SUR NIA LIBROBRETO

Lirila rojo

de LAŬLUM

GREKA KAJERO KAJ ALIAJ VERSOJ poemaro de Gerardo Vakano, kun Esperanta traduko de Amerigo Janakono. Eld. de Eldonoj EVA. Formato: 11.5×16.5 cm. 80 p. Prezo ne montrita.

Jen kolekto de 25 lirikaj poemetoj plejparte (16 el ili) verkitaj de Gerardo Vakano, lernejestro de Sora Liceo, rektoro de Tulia Nacia Kolegio en Arpino, fondinto kaj prezidanto de la Literatura Stud-Centro "Kumina Valo" kaj de la samnoma Literatura Premio, post ekskurso kun Sora Liceo en Grekio dum 17-22a de aprilo, 1989. Ĝi estas la lasta el la 12 poemaroj de la aŭtoro. Legante la versaĵojn senrimajn mi sentas, kvazaŭ mi aŭskultus lirilan rojon, kiu trafluas kvietajn kamparojn kaj olivarbarojn en montregiono kaj recitative rakontas pri siaj vidaĵoj en la trafluejo plena je floretoj ridetantaj en paco. El la versoj mi perceptas mildecon de animo kun kompreno pri interpopola amikeco kaj variaj vivuoj kaj veoj de la vivo. Animo sen forta emociigo pro tempesto kaj uragano, animo alcutimiĝinta al lirilo de rojo. Mi citu kelkajn el la plej plaĉaj al mi:

De Ateno ĝis Suniona Kabo

*De Ateno ĝis Suniona kabo
sepdek kilometroj
da montetoj kaj plaĝoj.
La unuetaĝaj domoj
inter olivarboj
ŝajnas gregeroj.*

*Ŝajnas ankoraŭ — mirakle
en tiu ĉi dudeka
jarcentfino — Manzonaj
paŝtiĝantaj ŝafoj.*

Vino el Grekujo

*Vino el Grekujo, sunkolora,
rubenkolora, gusto
de tero, maro, vento,
montaera aromo.
Vino dika, sentoriĉa
simile al la mito.
Vino juna kaj antikva
kiel la herooj el kiuj
la nomon ci prenas.*

Vilaĝa vivo

*Vilaĝa vivo ne estas dormema
sed lantmova,
pli kuniga kaj pli intensa.
Kiaj gustoj, kiaj odoroj, kiaj koloroj!
Kiaj amoj,
(kaj ankaŭ amoroj, ja),
kiaj malamoj, kiaj pasioj.*

.....

La traduko estas en lingvo klara, bonstila kaj tre facila, kiel tia en arta prozo. La preso estas bela, preskaŭ sen miskomposto. Entute rekomendinda legaĵo ne nur por versemuloj sed ankaŭ por aliaj revemuloj. ■

Homoj, ne donu morti!

Tiun ĉi leteron kortuŝan skribis la rusa esperantisto Aleksej Nikulin. Lia patrino s-ino Nina sendis ĝin al nia redakcio. Kun simpatio ni publikigas ĝin ĉi sube, esperante, ke lin helpos bonkoruloj, almenaŭ per varma konsolo, por ke li plenblovu la velon de la vivo. Ni kore deziras, ke Aleksej fariĝu pli firma en batalo kontraŭ la malsano kaj resaniĝu.

La Red.

Mi turnas min al vi kun mia doloro, kiu turmentas min multe da jaroj. Mia nomo estas ALEKSEJ. Mi havas 17 jarojn. Mi loĝas en Murmansko de Rusio kaj lernas en mezlernejo, sed pro stato de sano instruiĝas hejme. En 1992 mi akiris "ateston pri nekompleta meza klereco", ĉiuj lernobjektoj estas "tre bone". Mia plej ŝatata lernobjekto estas matematiko. Mi amas ŝakludi, sed ludas kun geknaboj el Murmanska ŝaka klubo nur per telefono. Mi amas futbalon, hokeon; sed devigita kontentigi min nur per televidilo. En mia vivo ĉio estus belega, se ...

En mia 4-a jaro al mi diagnozis oni — **PROGRESINTA MUSKOLA DISTROFIO**. Antaŭ tiu aĝo mi kreskis kaj evoluis absolute normale. En la 7-a jaro mi ekiris al lernejo, sidis kun geknaboj, ĉe la pupitro. Sed jam en ĉi tiu periodo laŭgrade pligrandiĝis muskola malforteco en gamboj. Al mi fariĝis malfacile movi gambojn, kaj de la 8-a jaro mi tute ĉesis iri. Stato de mia sano konstante malboniĝis. Post iom da tempo mi malfacile levis brakojn, kaj poste eĉ tute ĉesis ilin levi, aperis kontrakturoj de gamboj kaj brakoj. Nek masaĝo, nek fizikaj ekzercoj, nek medikamentaj rimedoj donis ian pozitivan rezulton. Dum tiuj 13 jaroj min veturigis gepatroj por kuracado. Ĉiujare ni elveturis en sanatoriojn aŭ klinikojn de nia lando. Sed ĉio estis vana.

Nun tutan mian tempon mi pasigas per legado. Kiel al mi enuis tia "vivo". Sed dum la lastaj 2 jaroj neniu kuracisto eĉ unu fojon venis eĉ por informiĝi pri mia sano!

Mi ne povas min priservi kaj plene dependas de aliaj. Mi jam estas plenaĝa. Mi Ne Povas Tiel Plu! Sed sidi kaj atendi ion ne estas mia karaktero. Kien ni ne skribis? Sed

estas unu respondo: en tuta mondo oni ne kuracas ĉi tiun malsanon.

Panjo, fininta kursojn de internacia lingvo Esperanto, komencis korespondi kun esperantistoj en multaj landoj, sed nenian rezulton akiris.

Mi jam preskaŭ perdis esperon pri resaniĝo, kiel subite en Ĵurnalo mi legis, ke progresintan muskolan distrofion oni estas komentanta Kuraci en Unuiĝintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko, en Stenforda Universitato.

Ekflamis fajrero de espero! Sed, por efektiviĝi mian revon pri resaniĝo, estas necese centoj da miloj da usonaj dolaroj! Kie mi akirus tiom da mono?

Por mi kuracado en Stenforda Universitato estas la plej lasta espero; ĉar ĝi estas la sola loko sur la Tero, kie oni povas kuraci mian malsanon!

Mia malsano progresas! Sed mi jam malfacile sidas!

Homoj bonaj, mi petegas, helpu min resaniĝi! kiu povas helpi min, sendu usonajn dolarojn en:

Ŝpara banko de Rusio, Kalkula konto N 0730000028, por Murmanska banko N 06500041, al Lenina fako, Konto N 6500114001 por nomo de NIKULINA NINA ALEKSEJEVNA (por kuracado de invalido de I-a grupo de NIKULIN ALEKSEJ ALEKSEJEVIĈ).

Mia adreso: RUSIO, 183038 MURMAN-SKO,

PRIVOKZALNAJA, 20-8 Aleksej Nikulin. ■

Li elektis vivon

SUR la laktobovinejo regis vespera kvieteco. Subite bruego de aŭto rompis la kvietecon. Bredisto Johano eliris el la domo kaj vidis apud la stalo buldozon, sur kiu viro histerie kriegis: “Mi detranĉis mian kruron. Helpu min, alie mi mortos!”

Johano estis surprizita de la vidaĵo, sed li tuj konsciis, ke la krianto bezonas urĝan savon. Li venigis ĉiujn en la bredejo kaj ĝustatempe portis lin al hospitalo.

La krianto nomigis Donaldon. Lian malfeliĉon kaŭzis lia bela plano: Li intencis konstrui novan domon por siaj 35-jara edzino kaj 17-jara filo. Tiutage fininte sian laboron, li iris haki arbon.



(Daŭrigo de p. 10)

la ĉefa parto de la fremdvaluta negoca merkato. Due, starigi unuigitan negocan sistemon, retigi per komputoro la fremdvalutajn bankojn por interkomunikiĝi iliajn negocojn, rapidigi negocadon kaj likvidadon. Trie, ellabori leĝojn kaj statutojn, normigi kaj leĝigi fremdvalutan negocadon.

Ĉu *Renminbi* devalutiĝos, ĉu la prezoj povos teni

Subite dika trunko falis sur lin kaj rompis lian maldekstran kruron. Pli malfeliĉe, ke la dika trunko peze premis lian kruron al la tero.

Li pene fosadis la teron sub sia kruro por eltiri la vunditan gambon. De tempo al tempo li ĉesis fosi kaj kriegis por helpo. Sed lia krio ne povis penetri en la densan arbaron, kaj neniu povis aŭdi lian krimon. Li ne kriis plu kaj persiste fosadis la malmolan teron.

Sed li renkontis grandan ŝtonon, kiun li neniel povis movi. Li ĉesis fosi kaj pensis pri la ebleco de saviĝo. Se li atendos, ĝis kiam la edzino venos serĉi lin, eble li mortos pro perdo de sango. “Mi kunportas tranĉileton,” subite li rememoris. “Se mi deziras elturniĝi el la danĝero, eble la unika solvo estas detranĉi la rompitan kruron.”

Li prenis ŝtonon kaj akriegis la tranĉileton sur ĝi. Sed li subite sentis teruron. Li hezitis tri aŭ kvar minutojn kaj ekagis. Post dolora minuto, li detranĉis la rompitaĵojn ostopecojn kaj karnon kaj tuj sentis tajdan ekscitiĝon: “Mi liberigis mian piedon!”

La klarmensa Donaldon bone sciis, ke li nepre devas atingi la vojon, ĉar nur tie li povos esti rimarkita. Li rampis kun la sanganta kruro pli ol cent futojn supren kaj malfacile suriris sur sian buldozon. Li veturigis ĝin 1.5 kilometrojn kun raspilo en mano, por ke ĝi funkciu kiel la maldekstra piedo. Fine li atingis la bredejon.

Donaldon atribuis sian saviĝon al sia kuraĝo kaj aplombo. Oni jam ne povis rekunigi la derompitan kruron, ĉar ĝi disiĝis de la korpo de Donaldon antaŭ longa tempo kaj serioze difektiĝis ĝia histo.

La familianoj donis al li plej altan laŭdon kaj pli multe da amo. “Li estas la plej brava el la vivantaj homoj,” tiel lin taksis lia filo. Lia edzino diris kun fiero: “Li tion faris por reveni inter nin.”

Donaldon diris: “Mi vizaĝis al elekto inter vivo kaj morto. Mi havas multajn motivojn por vivi plu, tial mi faris tion, kion mi povis fari — elekti vivon.” ■

sin en ekvilibro, post unuigo de la tarifoj? Fakuloj diris, ke sur la nuna merkato fremda valuto por plejparto de la varoj estis aĉetita laŭ la merkata kurzo de la fremdvaluta regula merkato, la unuigo de la tarifoj ne kaŭzos prezaltigon de ordinaraj varoj. Samtempe, la ŝtato daŭre alprenos rimedon malaltigi la tarifon de importitaj varoj por teni prezojn en stabileco. ■

ESP-NOVAĴOJ

● La Kvara Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazos en la Centra Nacia Universitato de Pekino. En la 9-a kaj la 10-a de julio ĉi-jare la Organiza Komitato de la konferenco akceptos ĉinajn kaj alilandajn esperantistojn en la Pekina Stacidomo kaj Pekina Flughaveno. Bonvolu anticipe sciigi al la Organiza Komitato la tempon de via alveno kaj la numeron de via aviadilo.

● De la 8-a ĝis la 22-a de marto 1994 okazis ekspozicio pri infanaj desegnaĵoj ĉe la ŝparkaso en Valence de Francio sub la protektado de la klubo Nova Stelo. En ĝi estis eksponataj verkoj de 8-13-jaraj infanoj el 14 landoj. La temo estis "La arbaroj de la mondo". Multaj personoj kun plezuro ĝin vizitis. La celo de tiu manifesto estis disvastiĝi la internacian lingvon Esperanto. La iniciatinto de la ekspozicio estis M. Tourtois.

● La urbestraro de EL VENDRELL, Hispanio, kunvokas la Premion Andreu Nin, kiun oni aljuĝos al esplora verko aŭ tezo pri sociaj kaj politikaj temoj verkitaj en kiu ajn lingvo. Povas partopreni en la konkurso ĉiuj neeldonitaj verkoj. La premio konsistas el 1 000 000 pesetoj por verkisto aŭ verkistoj kaj la publikigo de la verko. La fina dato por prezentado estos la 31-a de decembro de 1994. Verkistoj, mendu la regularon de la Premio Andreu Nin rekte al: Barcelona Esperanto-Centro Carreras i Candi 34-36, E-08028 Barcelono, Hispanio.

● La Kultura Esperanto-Domo en Baugé de Francio aranĝos diversajn kulturajn programojn dum julio-aŭgusto de 1994: 1. internacia renkontiĝo de infanoj; 2. internacia

amika renkonto; 3. trinivelaj E-kursoj; 4. praktika kaj perfektiga kursoj; 5. diversgradaj kursoj por la instruistoj k.a. La adreso: Kulturdomo de Francandaj Esperantistoj, Kastelo Gresillon, F-49150, Baugé, Francio.

● Kiel kutime, la printempa duobla numero de "Heroldo de Esperanto" enhavas liston de feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto. La listo por 1994, en kiu aperas datoj, adresoj kaj programoj, priskribas ĉ. 250 aranĝojn en la tuta mondo. Oni povas senpage ricevi la koncernan duoblan numeron, petante ĝin ĉe la redakcio: "Heroldo de Esperanto", Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (TO), Italio.

● En la plej suda provinco de Brazilo viglas pluraj E-organizoj, kiuj iniciatas kursojn kaj eventojn, ekz. ĉiumonata kunsido — VERDA KAFO, kiu okazas jam de pli ol 12 jaroj. Oni gaje babilis, planis kaj festis naskiĝtagon.

● La ĝenerala membrokunveno de la Pacifisma-Socialista Partio en la 18-a de decembro, 1993 decidis akcepti la sekvantan eron en la paragrafo pri instruado de sia elektoprogramo 1994-1998: Esperanto devus esti akceptita kiel dua lingvo en la ĝenerala programo (por infanoj) ekde la sepjara aĝo. Pri tiu ero la partio celas aldoni la fakon Esperanto en la regula instruado en Nederlando.

● La 11-an de decembro, 1993, la Esperanto-Fako de Klubo de Amikoj de UNESKO de Barcelono organizis specialan feston por celebri la 30-jaran datrevenon de ĝia oficiala akceptado kaj fondiĝo. Pli ol 50 gesamideanoj kaj amikoj rigardis la ekspoziciitajn historiajn fotografaĵojn kaj cirkulerojn.

● Esperanto-Centro Humanis-

mo komencas varbadon por Esperanto-ekspozicio en amika gastejo en Iggelbach, kiu malfermiĝis por Esperantio. La adreso: Roland H. Hegen, Esperanto-Centro Humanismo, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-67471 Elmstein 2, Germanio.

● En la centro de la ĉefurbo de Kolombio — Bogota estas "Konstruaĵo Esperanto", kie Esperanto-Klubo Mayo aktive laboras diversmaniere kaj diverscele, ekz. instruado, praktikado, arto, informado kaj organizado.

● Kroata Esperantista Unuiĝo organizis Zamenhof-tagan feston en Zagrebo la 11-an de decembro, 1993. Tio fakte estas komenco de la Tagoj de KEU. Dum la solena programo estis proklamitaj rezultoj de la Literatura Konkurso "Ivo Rotkvič", kiun la sesan fojon organizis Zagreba Esperanto-Ligo. Junaj membroj muzikis, dancis la folkloron kaj gvidis programon. Ĝin partoprenis ne nur esperantistoj el Zagrebo, sed ankaŭ el kelkaj aliaj kroataj urboj.

La 28-an de decembro 1993 oni celebris la 85-jaran jubileon de la fondiĝo de unua E-societo en Zagrebo.

● Frank Buckley, angla advokato kaj Esperanto-pioniro, festis sian okdekjarigon la 16-an de junio, 1994.

Li estas dumviva membro de la Brita Esperanto-Asocio kaj la Universala Esperanto-Asocio, kaj prezidanto de la Bristola Esperanto-Asocio. Dum longaj jaroj li instruas kaj propagandas Esperanton.

Junaj membroj de la Kroata E-Unuiĝo en la Zamenhoftaga Festo en Zagrebo



Esperanto-Domo en Bogoto de Kolombio



Novaj loĝdomoj de Kamparanoj

Parto de Dongzhou-vilaĝo

Fotoj de LI CHUNGENG

Enirinte Dongzhou-vilaĝon, oni povas vidi vicon post vico da eŭrop-stilaj du-etaĝaj domoj kaŝitaj en verdaĵo.

La vilaĝo situas en Sanyuan-gubernio, norda Shaanxi-provinco, kun ĉ. 100 familioj. Antaŭ dek jaroj la pokapa enspezo de la vilaĝanoj estis nur 131 juanoj. Kun la profundigo de la reformado kaj pordomalfermo la vilaĝanoj sin liberigis de la kateno de la monotona agrikultura ekonomio kaj, utiligante lokajn riĉfontojn, starigis kolektivajn entreprenojn kaj disvolvis privatan ekonomion. La vilaĝanoj diligente laboris kaj eliminis sian malriĉecon. Fine de 1993 ilia pokapa enspezo atingis 4 600 juanojn.

La vilaĝo kolektis ok milionojn da juanoj kaj per tiom da mono konstruis 105 loĝdomojn por 105 familioj, kaj la pokapa loĝ-areo atingis 58 kvadratajn metrojn. Nun estas finkonstruitaj kultura centro, maljunulejo, infanvartejo, sanitarajo k.a.




Novaj loĝdomoj



Promenejo en la vilaĝo

En salono de kamparana familio



Kupra urbo kaj Anqing

de JI PING

EN la urbo Tongling estas la reliefo Bronza Muro, sur kiu vidiĝas antikvaj ĉinoj ekspluatantaj kuprajn ercojn. Meze de la reliefo estas giganta vinujo en formo de rabobesta kapo, imitita laŭ tiu de Shang-dinastio (la 17-a jc — la 11-a jc a.K.). Preminte la butonon, mi vidis, ke klara akvo tuj verŝiĝas malsupren laŭ la vinuja rando.

Jam en la antikveco la urbo Tongling estis honorita kiel kupra urbo. La kupra urbo situas ĉe la suda bordo de Yangzi-rivero. Ĝi ampleksas tri distriktojn kaj unu gubernion, kun 610 000 loĝantoj, el kiuj 270 000 loĝas en la urbaj kvartaloj. Tongling kovras sume 1 113 kvadratajn kilometrojn. Antaŭ 3 000 jaroj t.e., en la dinas-

tioj Shang kaj Zhou, oni fandis tie kuprajn ercojn. Nun en la urbo vidiĝas restaĵoj de la antikvaj kupraj minejoj Jinniu(Ĝinniŭ)-kaverno, Wanying-monto, Muyu-monto kaj Tongguan-monto. Tongguan signifas kupran oficiston en la ĉina lingvo. Ĝi ricevis la nomon pro tio, ke en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-24 p. K.) imperiestro Liu Che (140-87 a.K. sur trono) sendis tien oficiston administri la kupro-ekspluaton.

LULILO DE LA BRONZA KULTURO


En la lastaj jaroj gravaj malkovroj de ĉinaj kaj alilandaj arkeologoj en Tongling montris, ke la urbo Tongling estas unu el la luliloj de la bronza kulturo de la mondo.

Antaŭe iuj alilandanoj opiniis, ke la ĉina bronza kulturo devenas de Okcidento, ĉar en Ĉinio oni ne trovis kupran produktaĵon. La tezon oni refutis nur en la 70-aj jaroj, kiam oni prifosis antikvan kupran minejon en Daye, Hubei-provinco. En la lastaj jaroj ĉinaj arkeologoj malkovris plurajn antikvajn kuprajn minejojn, tio certigis la longan historion de la ĉina bronza industrio. Oni konstatis post arkeologia esploro, ke sur la tersurfaco de Tongling estas 10 milionoj da tunoj da kupra skorio, forlasita de la antaŭaj dinastioj, kiuj entenas ĉ. 600 000 tunojn da kupro.


Arkeologia prifosado montris ankaŭ, ke Tongling estas unu el la ĉinaj regionoj, kie oni plej frue malkovris kaj uzis kupron. En la antikveco la tiea kupra muldado sufiĉe progresis. Tie estis elterigitaj 200 specoj da bronzaĵoj, kiaj porritaj instrumentoj, muzikiloj, vinujoj, kuiriloj, armiloj, terkulturiloj, speguloj kaj aliaj vivbezonaĵoj kaj produktiloj. Tiuj ĉi valoraj historiaj objektoj montras la influon de la kulturo de la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero kaj ankaŭ portas lokajn trajtojn sude de Yangzi-rivero. Estas menciinde, ke ĉiuj dinastioj de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p.K.) ĝis Song-dinastio (960-1279) muldis kuprajn monerojn en Tongling.

Tongling estas unu el la ses sintezaj kupraj ekspluatejoj de Ĉinio

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO



1. Tongling 2. Anqing



La Tongling-a Pontego super Yangzi-rivero en konstruado

Foto de **ZHANG CHANGJIANG**

kaj en ĝi estas ses minejoj, du kupraj fandejoj kaj dekoj da prilaborejoj de oro, arĝento kaj kupro. La kupra produktokvanto de Tongling okupas la duan lokon en Ĉinio. Sole la kupra minejo de Tongguan produktis 230 000 tunojn da kupro en la pasintaj 40 jaroj.

En Ĉinio mankas kupraj riĉfontoj, tial la ŝtato ĉiam donas grandan atenton al la urbo Tongling. En la 50-aj kaj 60-aj jaroj, kiel sekreta industria regiono, ĝi estis izolita. En 1990 ĝi estis enlistigita kiel malferma urbo ĉe Yangzi-rivero.

Post ekpraktiko de la pordomalferma politiko eksterlandaj investantoj venis tien unu post alia. Sole en la pasintaj kvar jaroj la magistrato jesis por starigi 15 entreprenojn investitajn de eksterlandanoj. Laŭ la kontraktoj oni uzis 36 milionojn da usonaj dolaroj investitaj de eksterlandanoj. Kaj krome, konstruado de la Tongling-a Ŝosea Pontego super Yangzi-rivero estas fierinda por la Tongling-anoj. Super Yangzi-rivero kuŝas multaj pontoj, kiaj tiuj en la provincoj Sichuan, Hubei, Hunan, Jiangxi (Ĝjangŝji) kaj Jiangsu, sed super 400-kilometra parto de Yangzi-rivero en Anhui-provinco kuŝas neniuj ponto. Tio multe malfaciligas la trafikon de la loko. La konstruado de la Tongling-a, Ŝosea Pontego super Yangzi-rivero inaŭguriĝis en 1991

kaj ĝi transdoniĝos al uzado en 1995. Tiam la aŭtoveturado de Hefei, la ĉefurbo de la provinco, al Tongling bezonos nur du horojn, sed nun kvin horojn. Se turistoj aŭte ekveturos de Hefei, ili do povos atingi samtage la belan Huangshan-monton je 189 km sude de Tongling kaj la faman budhisman monton Jiuhua (Ĝiŭhŭa) je 92 km for de Tongling.

SANCO POR DISVOLVIĜO DE LA URBO ANQING

En 1861 la urbo Anqing produktis la unuajn vapormaŝinon kaj ŝipon de Ĉinio, per kio ĝi skribis brilan paĝon en la historio de la ĉina nacia industrio. Hodiaŭ, dank' al la politiko de reformado


kaj pordomalfermo, la urbo eniris en novan epokon de sia disvolvigo.


La urbo Anqing situas norde de Yangzi-rivero, ĉe la limo inter la provincoj Anhui, Hubei kaj Jiangxi. De 1760 ĝis 1937 ĝi estis la ĉefurbo de la provinco kaj nur post 1937 la politika kaj kultura centro de la provinco transloĝiĝis norden kaj la urbo Anqing fariĝis malprospera.

“Nun Ĉinio plenenergie ekspluatas la regionojn ĉe Yangzi-rivero, kio donis al Anqing bonan ŝancon disvolviĝi,” diris s-ro Shi Mankai, respondeculo de la urbo. Li diris ankaŭ, ke la urbo konsistas el ok gubernioj kaj tri distriktoj, kun areo de 15 000 kvadrataj kilometroj kaj 5.8 milionoj da loĝantoj. Tie estas abundaj riĉfontoj. La haveno de Anqing estas unu el la 10 gravaj havenoj ĉe Yangzi-rivero. Koncerne la lokajn industriojn, dank' al kelkdek-jara konstruado, ili havas kompare fortan fundamenton. La Petrolkemia Fabriko de Anqing ĉiujare povas prilabori tri milionojn da tunoj da nafto kaj produkti 300 000 tunojn da sinteza amoniako kaj 520 000 tunojn da ureo. Nun ĝiaj produktaĵoj estas vendataj ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la internacia merkato. La fabriko nun plimultigas instalaĵojn, per

En la laborejo de elektrolita kupro de la Dua Fandejo de Tongling

Foto de **ZHANG CHANGJIANG**






Dilon-produkta linio en entrepreno investita de Ĉinio kaj alia lando
Foto de AN XUAN



Strato de Anqing kondukanta al ekspluata distrikto
Foto de AN XUAN




En laborejo de la Anqing-a Lankovrila Fabriko
Foto de ZHANG CHANGJIANG

kiuj produktiĝos 50 000 tunoj da akrila nitrilo kaj 50 000 tunoj da akrilaj fibroj ĉiujare. La konstruado estos finita en 1995. Tiam la fabriko fariĝos granda kombinato,

kiu produktos kemiajn fibrojn kaj aliajn kemiaĵojn kaj rafinos oleon. En la lastaj jaroj la urbo mem kolektis monon por fondi ekonomian kaj teknikan ekspluatan


distrikton, kiu nun jam havas investon de 450 milionoj da juanoj.

La urbo Anqing estas la hejmloko de la Anhui-a opero. La opero estas multe prezentata en la



Ekspluata distrikto en konstruado

Foto de AN XUAN



En laborejo de la Anqing-a Kemisterka Fabriko ekipita per francaj instalaĵoj

Foto de WANG XIUYING

provincoj Anhui kaj Hubei. Ĝi estas ludata ankaŭ en nordaj provincoj de Ĉinio. La opero, kun bela melodio de popola kanteto, estas tre ŝatata de la ĉina popolo.

Antaŭ mia forlaso de Anqing mi rigardis du gigantajn ankrrojn ĉe la antikva pagodo Zhenfeng en la urbo. Oni diris al mi, ke la antikvuloj faris tiujn ĉi ankrrojn por gardi la urbon kontraŭ inun-

do. Ja ne estas grave, ĉu ili sukcesis en rezisto kontraŭ superakvo aŭ ne, sed hodiaŭ la urbo jam levis sian ankron. Nun ĝi kun plenvloviĝinta velo iras al la maro de merkata ekonomio de la mondo. ■

En la mondo de Rodin

CU jam reviviĝis skulptaĵoj de Rodin, franca skulptura majstro? Ĉu klarigi, disvolvi aŭ rekrei la skulpturon?

Kiam la Ekspozicio de Vivaj Skulptaĵoj de Wang Deshun portis al ni serion da demandoj, kiaj la supraj, ni ne povis ne kredi, ke eble s-ro Wang kreas novan arton.

En lamplumo Wang Deshun tutkorpe ŝmirita per griz-nigra ŝminko, kun brovostoj kaj haroj modlitaj, kvazaŭ venis el “Bronza Tempo” de Rodin. Kiam li malrapide paŝis al kopio de statuo de Rodin kaj kreis ĉarmajn figurojn per sia korpo surbaze de ĝi, li jam kunfandiĝis kun la arto de Rodin. Kompreneble, tie prezentiĝis ne nur la arto de Rodin, sed ankaŭ la sperto, espero, batalo, ĝojo kaj ĉagreno de Wang Deshun.

Wang Deshun naskiĝis en 1936 en Shenyang, nordorienta Ĉinio. En infanaĝo li jam povis lerte imiti la faman usonan komediiston Chaplin. 24-jara, li fariĝis dramludisto kaj ludis 30 malsamajn rolojn. En 1985 Wang Deshun ekstudis la arton de homa korpo, kiun li kombinis kun pantomimo, kaj kreis poz-pantomimon. Ĝi esprimas la komunajn sentojn de la homaro per diferencaj pozoj, anstataŭ imiti agon el la reala vivo. En 1987 Wang Deshun kun sia pantomimo partoprenis la 12-an Internacian Pantomiman Festivalon okazigitan en Germanio. Tiel li la unua konigis la ĉinan pantomiman arton al internacia scenejo. Sed li ne kontentiĝis je la akirita sukceso. En liaj okuloj arto okupas la plej altan lokon kaj li rigardas kreadon kiel sian vivon de arto. Marton de 1993, okazis ekspozicio de verkoj de Rodin en Ĉinio. Wang Deshun tre emociiĝis post sia vizito de ĝi. Ĝuste tiam ĝermis en li la ideo pri okazigo de “ekspozicio de vivaj skulptaĵoj”.

Nun ni ĝuis “Eterna Printempo”, verkon de poz-pantomimo el Wang kaj reproduktitaj virin-figuroj kreitan imite al la fama samtitola verko de Rodin. Per ĝi inaŭguriĝis la ekspozicio de vivaj skulptaĵoj de Wang. Poste, Wang Deshun kun kopio de “Eva” de Rodin, poezie vidigis al ni la originon de la

homaro. Eva, elpelita el Edeno, timide rigardis mal-supren la homan mondon. La senĝena figuro de Wang bone ludis rolon en la verko. Li jen parolis kun trista Eva, jen konsolis kaj karesis ŝin, tiel ke ŝia hontemo pro malvirguliniĝo ŝanĝiĝis en neforgeseblan bedaŭron. Eva, ĉe la origino de la homaro kaj vizaĝe al doloro kaj feliĉo, iris al la homa mondo. Jen komenciĝis la “Vivo”. Tiu ĉi parto estas kristalaĵo naskita post kiam Wang studis pantomimon en la dekelkaj jaroj. Granda peco da blanka ŝtofo estis ununura rekvizito. Oni malrapide disvolvis la ŝtofon sur la korpo de Wang kaj ni vidis la figuron de novnaskito, kiun karesis sunradio. Li kreskis de malforta infano en petoleman knabon, poste al forta junulo. Sed iompostiome malheliĝis la lumo de la vivo kaj malaperis la viveco, kaj la junulo fariĝis maljunulo, kiu estis almozetanta. Fine li revenis en la naturon. Portempeco iasence estas eterneco. Jen en tio kuŝas la sekreto de la vivo.


La ekspozicio de vivaj skulptaĵoj de Wang estas arta provo signifoplena. Li plenumis la taskon per sia korpo. La solida bazo de drama prezentado donis al li grandan lertecon krei figurojn kaj la simetria korpo kaj fortaj muskoloj havigis al li idealan korpan strukturon. Kvankam li jam aĝas 57 jarojn, tamen liaj muskoloj sin trovas en plej bona stato en la vivo. De multaj jaroj Wang Deshun portis la deziron esprimi la sentojn de la homaro en movado. La ideo sin montri kune kun skulptaĵoj plivastigis lian pensadon. Eble la arto de Rodin donis inspiron al Wang Deshun. Tamen, oni devas atribui duonon de lia sukceso al lia edzino Zhao Aijuan (Ĝaŭ Ajĝĵuan), reĝisorino de la verko. Kiam iuj ne komprenis, kial ŝia edzo prezentis nuda, ŝi diris: “Wang Deshun estas mia edzo, kiel edzo, li apartenas al mi mem. Sed kiam mi faris artan kreadon per lia korpo, mi trovis, ke lia forta korpo estas ŝatata de tre multaj spektantoj, kaj mi komprenis, ke la beleco apartenas ne nur al mi mem, sed ankaŭ la homaro.” Ĝuante la prezentadon de Wang, la spektantoj estas kortusitaj kaj de la prezentado kaj de la sindonemo de la geedzoj.



Wang Deshun (dekstre)
kaj skulptita virina figuro



Sceno el hinda danco



Sceno el brazila danco

SUR SCENEJO


Alilandaj d prezentataj


Fotoj de ZHENG AIPING

Lastatempe la Orienta Kant-danca Ensemblo de Ĉinio okazigis grandan vesperon "Saluton, amiko!" Ĝi montris al la spektantoj la ĉarmon de arto de kantoj kaj dancoj. Ekz. la japana danco "Avaodori" prezentas la scenon, ke vespere de ĉiu festotago oni kolektiĝas sur strato, kun lanterno en mano, dancas kaj kantas dum la tuta nokto. La danco "Plej Proksime al la Suno" priskribas, ke afrikanoj adoras la sunon, opiniante, ke ĝi estas dio kaj verŝas amon al la mondo. La literatura verko "Mil Unu Noktoj" kondukas arabojn el izolita dezerto, el kio sekvas sennombraj legendoj. La danco "Ondoj sur Vastega Dezerto", adaptaĵo de unu el la legendoj, estis prezentata, gvidate de juna dancistino Zi Shali. Ŝi profunde impresis la rigardantojn per sia bela prezentado. Iuj diris, ke ili kvazaŭ vojaĝis tra la mondo, ĝuante la prezentadon.

La ensemblo estis fondita en 1961. En la pasintaj 30 jaroj ĝi prezentis en 60 landoj kaj regionoj de Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Azio. Kaj krome, ĝi ankaŭ sendis siajn artistojn studi en aliaj landoj. Ĝi kolektis pli ol 1 000 ĉinajn kaj alilandajn dancojn kaj kantojn kaj fariĝis renoma ŝtata ensemblo.

Sceno el hispana danco





Sceno el la japana danco "Avaodori"

*ancoj
de ĉinoj*



Sceno el la danco "Ondoj sur Vastega Dezerto"

Sceno el la danco "Plej Proksime al la Suno"



Sur la ruino de Niya

de LI ZHUO


EN 1901 la brita ekspediciisto Mark Aurel Stein trovis la ruinon de Niya en la profundo de la dezerto Taklimakan en Xinjiang (Sjingjang), Ĉinio kaj forŝtelis grandan kvanton da lignaj latoj kun skribo en Kharosthi-lingvo kaj grekstilaj lignoskulptaĵoj, kaj la loko tuj fariĝis multe atentata de eksterlandaj ekspediciistoj kaj arkeologoj.

Laŭ historiaj notoj Niya estis la sidejo de la regno Jingjue (Ĝingĝüe) de Ĉinio antaŭ dumil jaroj. Jingjue estis unu el la 36 regnoj en la okcidenta regiono de la antikva Ĉinio. En Tang-dinastio (618-907) la supera bonzo Xuanzang (Ŝjüanzang) trapasis la lokon, kiam li pilgrimis al Hindio por peti sutrojn. En sia verko "Notoj pri la Okcidenta Regiono de Granda Tang-imperio" li nomis la lokon urbo Wangzhinirang (Ŭangĝiniĵang). Sed kiel la antikva regno ĉe la Silka Vojo en la dinastioj Han (206 a.K. — 220 p.K.) kaj Tang rapide dezertiĝis kaj malaperis por eterne? Kio kondukis la belan oazan regnon al perejo? Ĉio tio lasis al la posteuloj eternan miron kaj imagon.

Kiam la esplora grupo el pli ol 50 membroj venis tien, la vidaĵo fascinis ilin ĉiujn. Sur la sablejo kun areo de almenaŭ 20 kvadrataj kilometroj ĉe la fino de la sekiĝinta Niya-rivero, oni vidis 50 ruinojn de budhaj stupaoj, temploj, muroj, domoj, kortoj, ŝafstaloj, fruktoĝardenoj, heĝoj k.a. En ŝafstalo estis dika tavolo da nigra fekaĵo, tre freŝa, kvazaŭ ellasita hieraŭ. La pordoj de iuj domoj estis malfermitaj aŭ duonfermitaj, kvazaŭ la mastroj ĵus forirus. Sur ŝpinrado estis bulo da blanka silko, kvazaŭ la ŝpinanto laborus tie ĵus antaŭe.

Ĉie sur la sablejo troveblas kernoj de persiko kaj abrikoto, ŝeloj de juglando, ostoj de bovo, ŝafo, ĉevalo kaj kamelo, ŝtonaj pilkoj por ĉasado kaj pecoj de ruĝaj fajencaj potoj. La sekiĝintaj pirarboj, poploj, jujubarboj, morusarboj kaj vinberaj pergoloj markis, ke antaŭe tie prosperis oazo kaj lando de vegetaloj.

La esplora grupo trovis tie ok kadavrojn en silkaj vestoj, ĉirkaŭvolvitajn per tolo. Inter ili estis neputra kadavro de virino. Ili havis longan kapon, mallarĝan vizaĝon, longan nazon kaj elstaran gla-



Ruino de la regno Niya

belon, en la aĝo de ĉ. 20 jaroj. Du el ili havis nigrajn harojn, dum la aliaj havis blondajn aŭ brunetajn. Ĉe iu kadavro oni trovis mansakon trikitan el ŝafa lano, kun bronza spegulo kaj ligna kombilo ene, kaj al la kombilo alkroĉiĝis kelke da blondaj haroj. La haŭto de la vizaĝo de la kadavro estis elasta kaj la brovoj estis maldikaj, ŝajne desegnitaj.

La kadavro de junulino en la aĝo de ĉ. 18 jaroj, kurbe kuŝanta sur unu flanko de la korpo, portis ruĝan kurtan lanjupon kaj silkan ĉemizon. Sub la ĉerko de tiu junulino estis alia granda ĉerko el popla trunko en diametro de unu metro. Oni malofte vidis tian sepultadon kun ĉerko sur ĉerko.

Laŭ antropologio iuj fakuloj opinias, ke la loĝantoj de Niya estis blankuloj, kaj aliaj opinias, ke ili estis mulatoj de armeanoj de reĝo Aleksandro de Makedonio, kiu faris ekspedicion al Oriento en la 4-a jarcento.

En Niya oni trovis 30 latojn kun skribo en Kharosthi-lingvo kreita en la 5-a jc a.K. en Gandhara regata de Persio kaj uzata en Niya, Loulan kaj Hetian en la 2-4-aj jarcentoj. Tiuj 30 latoj estis faritaj el popla ligno, kaj la tekstoj estis skribitaj per nigra inko. Ankoraŭ restas sur ili parto de argila sigelo. Ŝajne, la oficisto jam finis traktadon, sed ne havis tempon por sendi ilin. Li do portempe flankenmetis ilin aŭ metis ilin en fajencan poton. S-ro Wang Binghua de la esplora grupo diris, ke eble la skribo diskonigas fokusajn problemojn en la tiama socia vivo. Krome, la esplora grupo trovis ankaŭ monerojn de Han-dinastio, tranĉilojn, sagpintojn, jadaĵojn, ringojn, bidojn, felton, lanajn litkovrilojn kaj lignajn ŝpinradojn.

Fakuloj opinias, ke la grava eltrovo en Niya konvinkis, ke Niya estis la loko, kie koncentriĝis la civilizacio de la antikvaj Ĉinio, Hindio, Grekio kaj Persio. Ĝuste pro tio Niya fariĝis magneta loko. Krome, kompare kun la arkeologia esplorado de la antikvaj urboj Loulan kaj Dandanwulike englutitaj de sablo, tiu de Niya estas malfacila. Arkeologo de la grupo taksis, ke oni bezonas almenaŭ 50 jarojn por forigi la sablon sur tiu antikva urbo. ■

Tombo de la Flava Imperiestro sur la Loesa Altebenaĵo

Teksto de NAI YING

Fotoj de LI CHUNGENG

TIO estas tombo ekzistinta milojn da jaroj kaj ĉiam havas lokon en la koro de la ĉinoj. Ĉu en festoj ĉu en ordinaraj tagoj, la homoj venas de proksimaj aŭ malproksimaj lokoj, kaj iuj venas de trans maro por prezenti antaŭ la tombo incenson en signo de kulto. Kaj tio ne estas ordinara kulto, sed serĉado de la radikoj. Ĉiuj flavhaŭtaj ĉinoj sentas sin kiel hejme veninte tien. La venintoj ne konas unu alian, sed ĉiuj rigardas aliajn karaj. Ĉar en la tombo ripozas la homo, la komuna prapatro de la ĉinoj — la Flava Imperiestro (antaŭe esperantigita kiel Huangdi aŭ Hŭangdi).

La Flava Imperiestro havis la familian nomon Gongsun kaj la propran nomon Xuanyuan (Ŝjŭan-jŭan). Antaŭ 5 000 jaroj, kiam Ĉinio troviĝis en la socia periodo de klan^a komunumo, li estis ĉefo de la tribo Xia. Laŭ legendo lia periodo estis la unuaj jaroj de la antikva civilizacio de Ĉinio. Tiam la homoj jam povis fosi putojn, bredi silkraŭpojn, fari veturilojn kaj sagojn. Ankaŭ aritmetiko, medicino, muziko kaj kompasoj estis inventitaj en tiu tempo. Legendo diras, ke li povis tinkturi vestojn je kvin koloroj. Lia edzino Lei Zu instruis bredadon de silkraŭpoj. Cetere li komisiis al la analisto Cang Jie kreadon de hieroglifoj. Antikva libro de Ĉinio notis, ke “la Flava Imperiestro ekspluatis kuprajn ercojn sur Shoushan-monto kaj muldis tripiedajn ding-ojn (kuiriloj) sub Jingshan(Gingŝan)-monto”. Efektive oni trovis en multaj lokoj kuprajn kaj bronzajn ujojn kaj ornamaĵojn kaj ankaŭ skorion kaj kaldronon. La trovo konfirmis la noton en la historia libro. La saĝa Gongsun Xuanyuan progresigis la produktadon, konkeris la korojn de la popolo, trejnigis truojn, kaj poste unuigis ĉiujn tribojn en la baseno de la Flava Rivero kaj nomis sin Flava Imperiestro.

Historia libro notis ankaŭ, ke “la imperiestro estis entombigita en Qiaoshan”. Qiaoshan estas monteto nordoriente de la gubernia urbo de Huangling de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco. La Flava Rivero nutris la civilizacion de Ĉinio. Kunportante grandan kvanton da sablo, kiun pluvo alportis de la Loesa Altebenaĵo,

la Flava Rivero kuregis orienten, kaj tio kreis la fekundan teron de la baseno de la Flava Rivero, sur kiu vivis la Flava Imperiestro kaj liaj posteuloj... Flava tero, Flava Rivero, Flava Imperiestro... Ho, tiom da “flavaj”, ŝajne ĝuste en tio kuŝas la radikoj de la ĉina nacio kaj la ĉina civilizacio. Tial la posteuloj de Xuanyuan nomis sian prapatron per la vorto “flava”, lokis lian tombon sur la altebenaĵo kun dika tavolo da flava tero, konstruis templon sur la monteto kaj gravuris kvar ideogramojn signifantajn “prapatron de la homoj” sur la lintelo de la halo de la templo. Iom post iom la tombo de la Flava Imperiestro fariĝis la loko, kie la ĉinoj serĉis siajn radikojn.

Dank’ al la pli ol 80 mil maljunaj cipresoj, Qiaoshan-monteto fariĝis pli respektinda kaj sankta. Inter ili elstaras cipreso alta 19 metrojn, kaj la perimetro de la trunko estas dek metroj, kaj eĉ sep homoj kun etenditaj brakoj ne povas ĉirkaŭpreni ĝin. Laŭdire la arbo estis plantita de la Flava Imperiestro. La maljuna arbo tra miloj da jaroj aspektas tiel vivoplena kaj prospera, kaj la kultantoj rigardas ĝin dia arbo.

Por serĉi la radikojn kaj kulto la prapatron, oni devas fari meritojn. Ekzemple la talenta imperiestro Wudi (156-87 a.K.) de Han-dinastio antaŭ ĉio venis al Qiaoshan, post kiam li venkis en la ekspedicio al hunoj. Li demetis la kirason kaj pendigis ĝin sur la cipreso antaŭ la tombo. Nun la cipreso estas ankoraŭ fortika. Por informi la prapatron pri sia triumfo kaj peti longevivecon, la imperiestro Wudi faris “fean altaron” altan je 20 metroj kaj ĉirkaŭigis ĝin per cipresaj muroj. La teraso kaŝita en verdaĵoj pliimponigis la tombejon.


La duonsfera tombo de la Flava Imperiestro altas 3.6 metrojn kaj la perimetro longas 48 metrojn. Ĝi estis plurfoje riparita en la pasintaj dinastioj. La nunaj konstruaĵoj ĉe la tombo estis konstruitaj en la dinastioj Song (960-1279), Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911). Novembre de 1993 Ĉinio komencis refojan riparadon de la konstruaĵoj de la tombo.



Steleo de la tombo de la Flava Imperiestro

Antaŭ la tombo de la imperiestro staras ŝtona steleo kun surskribo “Surdrakiĝo ĉe Qiaoshan”. Mito diras, ke ĝuste de tie la Flava Imperiestro ĉieleniris rajdante sur longa drako. Ĉiujare tie okazas kulta ceremonio, kiam hele lumas ruĝaj kandeloj, harmonie bruas sonoriloj kaj tamburegoj. Miloj kaj miloj da homoj venas antaŭ la tombon kaj pie staras dronante en rememoro pri la prapatro.

Sur monteto unu kilometron sudoriente de la tombo estas Xuanyuan-templo konstruita en Handinastio. La templo kovras 11 662 kvadratajn metrojn. Sur la suda-norda akso sidas fronta pordo, traira kiosko, stelea kiosko kaj ĉefhalo. Kiam oni venas kulti la Flavan Imperiestron, ili devas ordigi siajn vestojn en la traira kiosko, kontroli la ofera-




Portalo, tra kiu oni povas iri al la tombo de la Flava Imperiestro

ĵojn, havigi al si kvietan animstaton kaj fine paŝi en la halon.

Post riparado la tombo de la Flava Imperiestro karakteriziĝos per pli klaraj trajtoj de la ĉina antikva kulturo. Post kultado en la halo de Xuanyuan-templo, oni venos al la merita altaro de la Flava Imperiestro. Poste oni trairos la dense ombratan vojon, suriros sur la “surdrakiĝan terason” sur la monteto Qiaoshan kaj fine venos al la loko, kie la Flava Imperiestro muldis ding-ojn kaj ĉieleniris. Sur la teraso apud la ripozejo de la prapatro oni havos pli larĝan vidkampon kaj facilan koron. Malsuprenrigardante la Loesan Altebenaĵon kaj aŭskultante la bruadon de la torenta Flava Rivero, ĉiuj ĉinoj pretervole ekhavas ekscitiĝon kaj fierecon pro la nacia civilizacio de 5 000 jaroj. ■



Kultantoj de la Flava Imperiestro



Ŝtona bildo de la Flava Imperiestro



Antaŭ la Granda Halo de la prapatro



Libera elekto de ofico en Ĉinio

MIA amiko revenis, fininte sian lernadon en Usono. Li goje diris al mi, ke li partoprenis en kunveno de laborperado de fakuloj kaj elektis kontentigan oficon inter ĉ. dek kompanioj, kiuj intencis lin dungigi.

Ke oni povas libere elekti oficon, kiel mia amiko, tio estis neimagebla antaŭ dekkelkaj jaroj en Ĉinio. Laŭ la moda diro, tio estas "fluado de talentuloj".

TENDENCO DE LIBERA ELEKTO DE OFICO

Menciante neliberan elekton de ofico, multaj ĉinoj sentis bedaŭron. Tiam Ĉinio praktikis la sistemon de planizita ekonomio, la diplomitaj studentoj senescepte estis postenigitaj de la registaro, tiel ke nemalmultaj forlasis sian fakon en la unua tago post sia enoficiĝo. Kaj krome, sub la rigora loĝanteca kontrolo ĉinoj ne rajtis transloĝiĝi de unu urbo al alia. Transloĝiĝo estis efektivebla nur post sankcio de policejo. Estis malfacile ŝanĝi oficon eĉ en sama urbo, ĉar tio estis limigata de loĝejo, salajro aŭ la servata institucio kiu ne volis forlasi ilin. Aliflanke, la oficejoj ne rajtis maldungi aŭ laŭbezone dungigi laborantojn en la socio. En tiu situacio preskaŭ estis neeble libere elekti oficon.

Kun la anstataŭigo de la ĉina planizita ekonomio per la merkata ekonomio, ankaŭ la malnova laboriga sistemo komencis disfali. Libera elekto de ofico kaj libera



Por elekti oficon en kunveno okazigita de la Ĝenerala Serva Kompanio de Fremdlandaj Entreprenoj en Pekino

dungado iom post iom penetrigis en la ĉinan laborigan sistemon, kio almenaŭ ŝanĝis por iuj elekton de profesio. Unue, ke aperis miloj kaj dekmiloj da individuaj entreprenistoj en la disvolviĝo de la merkata ekonomio kaj privata ekonomio, tio radikale ŝanĝis la laborigan staton de Ĉinio. Samtempe kun tio, krom la salajro difinita de la ŝtato, ankaŭ la entrepreno rajtas ellabori salajro-normon laŭ sia entreprenado kaj bezono, laŭleĝe dungi kaj maldungi laborantojn. Tio signifas, ke tiuj, kiuj havas administrajn sciojn aŭ teknikon, povas libere elekti oficon, por plibonigi siajn vivajn kaj laborajn kondiĉojn. Tial, kiam Ĉinio decidis konstrui specialajn ekonomiajn distriktojn en Shenzhen k.a., sennom-

braj labor-serĉantoj iris tien unuj post aliaj. Inter ili estis studentoj ĵus diplomigintaj el universitato, sukcesplenaj sciencistoj kaj teknikistoj kaj iuj oficistoj ne kontentaj pri la antaŭa laboro. En la reforma tajdo ili preferas esti mastroj de sia sorto por montri sian valoron. Por tio iuj el ili estas pruntitaj de la speciala distrikto, aliaj fiksloĝiĝis en la distrikto kaj la triaj ekloĝiĝis por esti dungitaj en la distrikto. Tiuj faktoj montras, ke libera elekto de ofico por ĉinoj jam ne plu estas iluzio.

KONKURADO PRI FAKULOJ

Eble de tiam la ĉina ekonomio ekimpetis. Intensa konkurado faris

neeviteblan defion al la entreprenoj en iliaj efektivaj fortoj en administrado, tekniko, vendado k.a. Entreprenistoj pli kaj pli klare konsciis, ke la merkata konkurado esence estas konkurado pri talentuloj. Direktoro de iu entrepreno kun profunda kono diris: "Ne progresas entrepreno sen kompetentuloj."

Tamen, laŭ la enketo farita de koncerna departemento, la nombro de diversfakaj teknikistoj urĝe bezonataj de la ĉina ekonomia konstruado ne estas tre granda, sed tre malgranda. En Pekino estas bezon-

has vastan perspektivon kaj altan salajron. Aliflanke, nesufiĉeco de talentuloj estigas intensan konkuradon inter la entreprenoj por allogo de talentuloj. Por akiri bezonatajn fakulojn, iuj entreprenoj ne domaĝis monon por aĉeti al ili domon, disponigas al ili aŭton kaj donas al ili altan salajron. Septembre de 1993 la diverslokaj vilaĝaj entreprenoj en Jiangsu-provinco la unuaj dungis universitatajn diplomitojn per alta salajro. Iu vilaĝa entrepreno de Wuxi eĉ forlogis en unu nokto ĉiujn kom-

sonoj k.a., kun la celo krei agrablajn kaj harmonian medion por formi situacion de libera elekto de ofico.

Samtempe, rapide disvolviĝis laboranto-interŝanĝaj institucioj, liverantaj sociigitan servon al libera elekto de ofico. Nun en Ĉinio funkcias pli ol 2 000 tiaj institucioj, 500 fiksaĵoj por labor-interŝanĝo. Laŭ nekompleta statistiko, en la pasintaj dek jaroj tiuj institucioj jam faris tiuflankajn servojn al ĉ. milionoj da homoj.

Nature, ankaŭ ekzistas iuj nebonaj fenomenoj en la labor-interŝanĝo:

Ne estas tute racia la orientiĝo de la talentuloj. En la unua interŝanĝa kunveno de sindungantoj en 1993 miloj da personoj esprimis sian volon labori en la marbordaj provincoj de orienta Ĉinio, kaj nur kelkaj volis serĉi laboron en okcidenta Ĉinio.

Multe perdiĝis la talentuloj, precipe tiuj en la gravaj ŝtataj scienc-esploraj institutoj grandnombre foriris eksteren.

Loĝanteca registro ankoraŭ restas faktoro malhelpi interŝanĝon de laborantoj.

Estas mamoniismo en labor-interŝanĝo.

Ekzistas loka protektismo. Iuj lokoj limigas laboranto-interŝanĝon per registaraj malpermesoj.

Ĉio ĉi montris nematuriĝon de la ĉina merkato de sindungantoj. Tial, dum perfektigo de la nunaj politikoj kaj leĝoj pri laboranto-interŝanĝo, rapidigi sintezan kompletigan reformadon de la socio fariĝis urĝa tasko. Por tio la ŝtato jam prezentis ĝeneralan celon kaj konkretan planon por plie disvolvi sindunganto-merkaton, planis perfektigi servojn de sindungantoj kaj adekvatajn politikojn kaj leĝojn en du jaroj, por fine formi relative perfektan sistemon de talentula merkato. Tiam nature fariĝos tute libera la laboranto-interŝanĝo. ■



Gejunuloj venintaj por ke oni donu al ili taŭgan oficon.

ata granda nombro da fakuloj de komercado, komputoro, kontado, arkitekturo, administrado, sekretaria posteno, publikaj rilatoj, telekomuniko, belarta reklamado kaj mekaniko. Pro tio oni faris analizon al 1 700 unuoj, la nombro de laborantoj por tiuj fakoj konsistigas nur 34% de la bezonata nombro. Tia stato, ke liverado ne konformas al bezono, unuflanke havigas al la fakuloj pli da eblecoj por elekti preferatan oficon. Sola neceseco por vivtenado jam ne plu estas ununura kriterio por elekto de ofico. Laŭ ili la plej allogaj estas la entreprenoj investitaj sole de alilandaj komercistoj, investitaj kune de Ĉinio kaj alilandaj entreprenistoj kaj tiuj novteknologiaj, kie la labormedio estas bona, la dungitoj

putoristojn de iu ŝtata entrepreno. Direktorino de iu pekina vesto-entrepreno nenion povis fari, kiam ŝiaj ofertistinoj estis forlogitaj. Ili foriris ĉiu kun komercsumo de centoj da miloj da juanoj.

PERFEKTIGI MERKATON DE FAKULOJ

Por ke oni estu vere liberaj en elekto de ofico, en la lastaj kelkaj jaroj la koncerna departemento de la registaro ellaboris serion da politikoj, inkluzive de ekzigo kaj maldungo de fakaj teknikistoj kaj administrantoj, konservado de dosieroj de migrantaj personoj, dungado kaj arbitracio pri konfliktoj en libera elekto de ofico, reguligo de la salajroj de migrantaj per-

Smeraldo sur dezerto


de YI QIHAO

La naturparko de Wuyi-monto

Foto de LI CHUNGENG

Aglido

Foto de LI CHUNGENG



Papilio

Foto de LIU SHUXIAN



Piceoj

Foto de **DING HAIXIANG**

La naturparko de Wuyi-monto en Fujian-provinco, unu el la kvin ĉefaj naturparkoj de Ĉinio, kovras 570 kvadratajn kilometrojn, kun raraj specoj de arboj kaj granda nombro da bestoj kaj birdoj. La naturparko estas rigardata de mondaj fakuloj kiel produkitejo de normaj specimenoj de estaĵoj de geno-banko kaj enlistigita kiel protekta regiono de la monda biosfero. Tial oni nomas ĝin smeraldo sur dezerto.

La naturparko situas en subtropika zono, proksime al la Orienta Ĉina Maro. Tie abundas akvo, sunlumo kaj varmo. Tie staras 377 montpintoj pli ol 1 000 metrojn super la marnivelo, inter kiuj 112 estas pli ol 1 500 metrojn super la marnivelo kaj sep almenaŭ 2 000 metrojn super la marnivelo. La ĉefa montpinto Huanggangshan, 2 158 metrojn super la marnivelo, estas la unua alta montpinto en sudorienta Ĉinio.

En la naturparko kreskas 2 466 specoj da altklasaj vegetaloj kaj 840 specoj da malaltklasaj, kaj ankaŭ ĉ. 50 specoj da postvivintaj kaj raraj vegetaloj. En ĝi vivas 100 specoj da bestoj, 300 specoj da birdoj, 110 specoj da amfibioj kaj rampuloj kaj 9 000 specoj da insektoj. La naturparko estas nomata ankaŭ "Natura Zoo", "Paradizo de Birdoj", "Lando de Serpentoj" kaj "Mondo de Insektoj".

Wuyi-monto estas ideala loko por turismo, scienca esplorado, instruado kaj somerumado.

Floroj

Foto de **LIU SHUXIAN**



Arbaro en urbo

KIO estas okulfrapa por la turistoj en la urbo Changchun de la Nordoriento de Ĉinio? Tio estas arboj.

Changchun situas sur Songliao-ebenaĵo, nordorienta Ĉinio. Ĝi kovras 30 369 kvadratajn kilometrojn, inter kiuj la urbaj kvartaloj ampleksas 1 203 kvadratajn kilometrojn. Dum longa tempo ĝi estis fama aŭta urbo de Ĉinio. Nun ĝi famiĝis pro sia arbarizado. Laŭ statistiko, la arbarizita areo de Changchun estas 4 393 hektaroj. Nun 36.6% de la urbo estas arbarizitaj kaj tiuflanke ĝi okupas la trian lokon inter la grandaj urboj de Ĉinio. Nun la pokapa arbarizita areo en Changchun estas 25.7 kvadrataj metroj, kaj per tio ĝi okupas la unuan lokon inter la grandaj urboj de Ĉinio.

En 1989 Jilin(Ĝjilin)-provinco decidis konstrui arbaran urbon en sia ĉefurbo Changchun. 20 kilometrojn sudoriente de la urbo la vidindaj lokoj Jingyue(Ĝingjüe)-lago, Xinli(Ŝinli)-urbeto kaj Antaŭurba Forstejo jam formis verdan ekranon kovrantan 10 000 hektarojn. Tie la pejzaĝo estas tre bela, ĉie kantas birdoj kaj aromas floroj. En la pitoreskejo Jingyue-lago oni jam arbarizis 3 800 hektarojn da kampoj, kie kreskas pli ol 30 specoj da arboj, kiaj ruĝaj pinoj, verdaj piceoj, prosperaj abioj, usonaj pinoj kaj frakse-

noj. En printempo kaj somero abrikotujoj, rozoj, rododendroj kaj platikodonoj (*Platycodon grandiflorum*) konkure disfloras. Tiam, se vi boatas sur la blua lago, antaŭ la verda monto kun prosperaj arboj vi certe raviĝas de la ĉarma pejzaĝo. Aŭtune, verdaj pinoj, palflavaj betuloj kaj ruĝaj aceroj ĉarmigas la lokon. Vintre, neĝkovritaj arboj kun la blanka fono de montoj prezentas la belan pejzaĝon de nia norda lando.

En la urbo Changchun sterniĝas 900 stratoj larĝaj kaj mallarĝaj. Ambaŭflanke de ĉiuj ĉefaj stratoj pompas arboj. Ja estas harmonia aranĝo en la arbarizado: tie kreskas arboj, ĉiamverdaj kaj falfoliaj, kaj ankaŭ arbustoj. De la sudo al la nordo ĉe la ĉefaj stratoj de la urbo pli ol 6 000 arboj el 40 specoj formas kvar verdajn zonojn.

La rivero Yitong, trafluanata la urbajn kvartalojn de Changchun, estis serioze poluita antaŭ 1985. Nun ĝi estas bone reguligita kaj ambaŭborde de ĝi sidas rubandforma parko 23 km longa, kie kreskas 130 000 arboj kaj sterniĝas gazonoj kun areo de 150 000 kvadrataj metroj. Sur 7 000 kvadrataj metroj da kampoj bonodoras diversaj floroj. Nun tie denove aŭdiĝas bela kanto de birdoj.

Dank' al ekspluatado de novaj distriktoj kaj reformado de



Parto de Changchun

la malnovaj, la verdaĵoj kreskas ĉie inter domoj. Antaŭ kaj post domoj nun verdas diversaj arboj kaj aromas multspecaj floroj. En la liberaj lokoj de la urbo estas promenejoj kaj gazonoj. Tie la artefaritaj montetoj, ŝtonaj benkoj, grimpan-taj lianoj, kuriozaj floroj kaj raraj herboj multe ĝuigas la loĝantojn. La loko estas ideala por matena korpo-ekzercado, promenado kaj ripozo.

Nun la projekto pri konstruado de la arbara urbo en Changchun jam estas ellaborita: En la urbaj kvartaloj la arbarizita areo estos 7 363 hektaroj. 40% de la urbo estos verdigitaj. Ĝi fariĝos moderna urbo kun verdigitaj stratoj, kortoj, grandareaj gazonoj kaj arboj kiel unu tuto. La 17 ŝjang-oj (administra unuo de Ĉinio, ĝenerale sub ĝi estas dekelkaj vilaĝoj) kaj distriktoj de la antaŭurbo konstruas arban zonon 50 m larĝan ĉirkaŭ la urbo. La 134 ŝjang-oj kaj distriktoj de la kvin gubernioj sub la magistrato konstruos sintezan sablovent-ŝirman sistemon. Tiam la montoj, domoj, stratoj, kortoj kaj kampoj ĉiuj estos kovritaj de verdaĵoj. ■

KULTURA MERKATO EN ĈINIO HODIAŬ

Nun la kultura merkato de Ĉinio estas prospera kaj samtempe ĝenata de multaj problemoj. Nun oni intensigas la administradon de la merkato.

En la lastaj jaroj la kultura merkato de Ĉinio disvolviĝis ĉefe en la jeno:

I. DIVERSECO DE LA ENTPRENADO.

La kultura merkato allogas pli kaj pli multe da investantoj kaj entreprenistoj. Kune ekzistas ŝtataj, kolektivaj kaj individuaj entreprenoj kaj entreprenoj investitaj de Ĉinio kaj eksterlando. Kun homaj kaj ekonomiaj avantaĝoj ili helpas unu alian. La nombro de familioj okupiĝantaj pri kultura entreprenado jam superis pli ol 300 000. Ili estas tre viglaj en la merkato.

La diversmaniera entreprenado de la kulturaj aferoj nuligis la antaŭan monotonecon en entreprenado kaj donis vivecon al la disvolviĝo de la merkato.

II. MALSAMECO DE LA KONSUMADO.

Dank' al plurjara ekspluato, la kultura merkato ne plu estas simpla merkato sole el filmoj, televidaj filmoj, teatroj, libro-vendejoj, gazet-budoj kaj amuzado. Nun ĝi ampleksas artan prezentadon, amuzadon, sonbendan kaj bildobendan prezentadon, belarton, filmojn, historiajn objektojn, postlaboran trejnadon kaj kulturalan interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj, kio senprecedence plivastigas la spacon de la kultura vivo kaj estigas kontinuan renovigon de la kultura konsumado.

III. SOCIIGO DE LA PARTOPRENADO.

La kultura merkato altiras al si konsumantojn kun malsamaj aĝoj, profesioj, intereso kaj kleriteco. Laŭ statistiko, ĉiutage la kulturalan merkaton vizitas 20 milionoj da homoj, kio plene montras ĝian sociecon.

IV. PROFITODONAJ FUNKCIOJ DE LA MERKATO. Krom amuzado, informo-interŝanĝo, amikiĝo kaj edukiĝo, la profitodona ekonomia funkcio de la merkato plene elvolviĝas. Dank' al prosperiĝo de la kultura merkato, aperis kultura industrio kun kulturo kaj ekonomio en kombino kaj harmonia disvolviĝo. Ĉar la kulturaj entoj povas finance vivteni sin, tial malpliigas la ŝarĝo de la ŝtato en investado por kulturaj aferoj.

V. NORMALIGO DE LA ADMINISTRA-

DO. Nun la administrado de la kultura merkato tendencas al normaligo kaj leĝigo kaj formiĝis administra reto el la registaroj centra, provinca, subprovinca, gubernia kaj distrikta. Aperis sinteza administra organismo, en kiu politikoj ludas gvidan rolon, reguloj limigan rolon kaj leĝoj garantian rolon.

DEZERTIGO KAJ AGRIKULTURO

Kaŭze de la ekscesa ter-malvirgigo, troa paŝtado kaj arbitra arbohakado, perdiĝis ekologia ekvilibro en iuj sekaj, duonsekaj kaj eĉ kompare malsekaj regionoj. Kaj nun ili dezertiĝas.

Ĉinio estas unu el la landoj plej serioze damaĝataj de dezertigo. En ĝia nordo la dezertoj kovras 1.49 milionojn da kvadrataj kilometroj, kiuj konsistigas 15.5% de la totala teritorio de Ĉinio. Inter ili la dezertigita areo atingis 444 000 kvadratajn kilometrojn, plejparte en la sekaj kaj duonsekaj regionoj de 12 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Nun 60% de la malriĉaj gubernioj de Ĉinio situas en la lokoj ofte atakataj de sablovento. La tieaj loĝantoj ankoraŭ ne solvis la problemon pri vestoj kaj manĝaĵoj kaj iuj el ili eĉ ne havas loĝejon.

Dezertigo malpliigas la utiligeblajn kampojn. Nun sablo ĉiujare englutas 1 560 kvadratajn kilometrojn da kampoj en Ĉinio.

Dezertigo mallevas la agrikulturalan produktokvanton. La kvar milionoj da hektaroj da kampoj de Ĉinio, damaĝataj de dezertigo, ĉiujare perdas 200 000 tunojn da greno.

Dezertigo mallevas la kvaliton de herbejoj kaj malhelpas la disvolviĝon de brutobredado. Pro dezertigo Ĉinio ĉiujare perdas 3.5 milionojn da tunoj da herboj, kiuj sufiĉas por nutri 4.8 milionojn da ŝafoj.

Dezertigo damaĝas akvoenergiajn konstruojn. Ĝi malhelpas akvorezervejojn en produktado de elektro, rezisto kontraŭ inundo kaj irigaciado.

Oni devas fari sintezan reguligon por batali kontraŭ la dezertigo, ekz., entrepreni akvoenergian konstruadon, protekti flaŭron, reguligi la proporcion de tera utiligebleco, pli grandigi kulturaladon de herboj, disvolvi forstumadon, starigi kamposirmajn forstojn. En Ĉinio miloj da sciencistoj kaj teknikistoj nun laboras por batali kontraŭ la dezertigo. Kunlabore kun lokanoj, ili efektivas la kontraŭdezertigan projekton. Dank' al ilia senlaca laboro, 10% de la dezertigitaj kampoj retrovis bonan ekologian medion.

Por sekureco de la ĉina civila aviado

Teksto de LI QIANG

Fotoj de LI CHUNGENG

LA civila aviado de Ĉinio disvolviĝas je senprecedenca rapideco. En 1993 estis lanĉitaj 79 aviadiloj kaj malfermitaj 63 novaj aerlinioj, inter kiuj 11 estis internaciaj. Tamen, la disvolvigo kaŭzis serion da neatenditaj problemoj, kia tiu de sekureco. Informo diris, ke aviadaj akcidentoj de 1993, en kiuj okazis morto kaj ekonomia perdo, strikte rilatis al administrado kaj servado. Ĝuste pro tio, nepre necesas intensigi la administradon de fluga taŭgeco de la ĉina civila aviado.


Por koni la flugan taŭgecon de la ĉina civila aviado mi vizitis departementon sub la Civil-Aviada Administracio de Ĉinio. Vicestrino Wu Xiangru (U Ŝjangĵu) diris al mi, ke Ĉinio komencis la administradon pri fluga taŭgeco nur antaŭ sep jaroj. Kvankam la 7-an de decembro 1944 Ĉinio subskribis "La Konvencion pri Internacia Civila Aviado" kune kun aliaj 51 landoj kaj iniciatis la Internacian Civil-Aviadan Organizaĵon por eviti malordon en internacia aer-transportado kaj

plifortigi sekurecon en internacia aviado, tamen pro diversaj kaŭzoj nur en 1972, kiam Ĉinio restarigis sian leĝan pozicion en UN, ĝi ree membriĝis al la Internacia Civil-Aviada Organizaĵo.

Laŭ la konvencio, la aviadilo devas havi atestilon pri taŭgeco por flugo. Ĝi postulas de la membro-landoj ellabori kompletan regularon pri fluga taŭgeco kaj fari administradon de fluga taŭgeco al aviadilo. En la lastaj jardekoj multaj landoj starigis sciencon kaj avangardan sistemon

de la administrado. En la mezo de la 80-aj jaroj la civila aer-transportado kaj la civila aviada industrio de Ĉinio rapide disvolviĝis. La ŝtato starigis gravajn aviadajn kompaniojn kaj malfermis novajn internaciajn aerliniojn; ekfunkciis lokaj aviadaj kompanioj en Xiamen (Ŝjamen), Ŝanhajo kaj aliaj urboj, kaj la enlandaj aerlinioj pli kaj pli multiĝis; estis produktitaj la ĉinaj civilaj aviadiloj Y-7, Y-8, Y-10, Y-11, Y-12; estis produktita la aviadilo MD-82 kunlabore kun alia lando, kaj

Kontrolo en kajuto





La aŭtoro (dekstre) kaj Wu Xiangru

aviadaj produktoj de Ĉinio eniris en la internacian merkaton. Por pli bone disvolvi la ĉinan aviadon aferon kaj plenumi la konvencion Ĉinio fondis la administracion pri fluga taŭgeco de civilaj aviadiloj kaj publikigis "La Regularon pri Administrado de Aviadila Flug-taŭgeco de la Ĉina Popola Respubliko".

En la pasintaj sep jaroj, laŭ regulo kaj normo de la Internacia Civil-Aviada Organizaĵo Ĉinio starigis sian administran sistemon pri fluga taŭgeco, kiu garantiis la sekurecon de la civila aviado kaj akcelis ĝian disvolviĝon. La 15-an de oktobro 1991, la registaroj de Ĉinio kaj Usono subskribis "La Interkonsenton pri Fluga Taŭgeco inter Ĉinio kaj Usono". Tio markis, ke la kunlaboro inter Usono kaj Ĉinio en civila aviado eniris novan etapon. Poste, estis starigita labora rilato inter la ĉina sistemo kaj tiuj de FAA de Usono, DGAC de Francio, LBA de Germanio kaj JCAB de Japanio, kaj la ĉinaj fakuloj partoprenis la aktivadon de la Internacia Civil-Aviada Organizaĵo.

Je mencio pri fortigo de


sekureco de la civila aviado, Wu Xiangru diris: "Nia laboro celas garantii la sekurecon de civilaj aviadiloj; ni faras sciencan kontroladon, inspektadon kaj administradon al projektado, fabrikado, uzado kaj riparado de civilaj aviadiloj surbaze de la sekuraj normoj difinitaj de la registaro."

En 1993, la administrantoj de la ĉina flug-taŭgeca sistemo finis kontroladon de projektoj pri produktado de la aviadilo MD-82 en Ŝanhajo. En kontrolado por produkti 40 aviadilojn MD-82, MD-90-30 en Ŝanhajo, Xi'an (Ŝji'an), Chengdu kaj Shenyang, oni trejnigis laboristojn kaj gvidis ilin en praktiko. Ili, kunlabore kun la Ŝtata Aviada Buroo de Usono, kontrolis la aviadilon Y-12.IV. Oni plifortigis la administradon de atestoj de aviadilaj riparistoj, sistemigis riparadon kaj okazigis diversajn kursojn por plibonigi la kvaliton de la riparistoj. La laboristoj de la ripara fabriko de la Aviada Kompanio Xi'nan faris flug-taŭgecan ekzamenon al Boeing 757 antaŭ kaj post ĝia flugo, ke ĝi ne prokrastis flu-


gon en 314 tagoj.

La aviadilaj kontrolaj centroj en Ŝanhajo, Xi'an kaj Shenyang respondecas pri la flug-taŭgeca administrado en fabrikado de aviadilaj partoj. Nun la administraj departementoj kaj aviadilaj kontrolaj centroj de Ĉinio kaj iliaj reprezentantoj en fabrikoj eksterlande serioze kontrolas, laŭ koncernaj normoj, la fabrikadon, eksperimentadon kaj uzadon de diversaspecaj aviadiloj.

En la lastaj jaroj la transporta kvanto de la ĉina civila aviado kreskis tre rapide, tamen iuj ĉeneroj ne adaptiĝis al la disvolviĝo. Samtempe eksterlandaj pasaĝeroj pli multe postulis regulan flugadon de aviadiloj. Kiel garantii la regulecon estas problemo koncernanta diversajn flankojn kaj rilatas rekte al intereso de la pasaĝeroj. Tial, la departementoj de la ĉina civila aviado, laŭ la principo de "sekureco, reguleco kaj bonkvalita servo", energie plifortigas la kunlaboron inter si kaj administradon de fluga taŭgeco. ■




Kontrolo de la cirkvita sistema de aviadilo




Motora provata





Reguligo



Simula eksperimento pri aviadila savado

En regadejo de datenoj



La antikva prozo de Ĉinio

de HOU JUELIANG

PROZO burĝonis en Ĉinio jam antaŭ 3 000 jaroj. Tiam aperis ideogramoj, kvankam nemultaj, tamen uzeblaj por notado. Tio pretigis necesan kondiĉon por burĝonado de prozo. Sed tiam papero kaj peniko ne estis elpensitaj, kaj la prauloj tranĉile gravuris sur testudaj karapacoj kaj bestaj ostoj notojn pri aŭguro, kulto, ĉaso kaj milito. Tio ja estis rudimento de prozo.

Poste aperis bronzaĵaj sonoriloj kaj *ding*-oj (granda kuirilo kun tri aŭ kvar piedoj kaj du teniloj), danke la evoluon de afinacio. La kortegoj kaj markizoj muldis bronzaĵojn kun teksto pri dekreto aŭ registraĵo pri politikaj eventoj, aŭ iuj aristokratoj muldis bronzaĵojn kun teksto pri atentigo al siaj posteuloj, ke ili bone konservu la

bronzaĵojn. Ankaŭ tiuj tekstoj estis rudimentoj de prozo. Ili estis relative longaj, el dekoj aŭ centoj da ideogramoj.


La antikva prozo de Ĉinio kompare bone disvolviĝis en la 8-a jarcento a.K., kaj pli kaj pli evidentiĝis literaturaj trajtoj. La tekstoj ne estis solaj notaĵoj, sed entenis komentarion kaj lirikismon. La aŭtoroj turnis sian atenton al elstarigo de temo, kompleteco de strukturo kaj klareco de kohereco. Tiutempe aperis la unua kolekto da prozaĵoj "Shang Shu". 28 pecoj el la verkoj herediĝis nun. La enhavo konigas ĉefe politikajn eventojn de la dinastioj kaj servas kiel gravaj materialoj por studi.

La antikva prozo de Ĉinio eniris en novan historian periodon danke sian disvolviĝon en tri jarcentoj post la apero de "Shang Shu". Mul-

taj filozofoj, pensuloj kaj historiistoj verkis grandan nombron da prozaĵoj.

La prozaĵoj de filozofoj kaj pensuloj karakteriziĝas per komento kaj filozofado. Metaforoj kaj fabloj estas ofte uzataj por rezonado de filozofia penso aŭ politika opinio. Tiele la prozaĵoj portas intensan literaturan koloron. Ekzemple, filozofo Mengzi admonis, ke oni observu objektivan leĝon, en sia artikolo kun la fablo "Kreskigi plantaĵojn per suprentiro". Ĝi tekstas, ke iu kamparano kulturis teron laŭ sia deziro. Li suprentiris la plantaĵojn en sia kampo kredante, ke tio rapidigos la kreskon. Kompreneble, la rezulto estis kontraŭa al lia deziro: Velkiĝis la plantaĵoj.

Historiaj prozaĵoj akcentas rakontadon, tamen gravigas komen-



Bo Le kaj ĉevalo

tarion kaj priskribon. Tiuj prozaĵoj estas uzataj ĉefe en historiaj libroj. Pere de prozo historiistoj klarigis gravajn historiajn eventojn kaj samtempe priskribis gravajn historiajn personulojn. Historiistoj en la antikva Ĉinio plejparte estis literaturistoj verkantaj biografion de historiaj personuloj.

Sed post la 3-a jarcento la ĉina prozo faris mispaŝojn. Parto da prozistoj troe akcentis la forman belecon neglektante la enhavon. Ili formaligis la frazojn, ke nepara frazo devas havi kvar kaj la para ses ideogramojn. Tia formalisma prozo aspektas bele kaj la legado estas belsona, sed la vanta kaj ŝablona enhavo tute izoligis de la socia realo. La disvolviĝo de prozo estis malhelpata.

En la 8-a jarcento Han Yu, eminentulo de la literaturistaj rondoj, kiu majstris en poemo kaj prozo kaj havis altan rangon, multe kontribuis por forigi la malhelpon. Li oponis kontraŭ formalaj verkoj kaj pledis por la tradicia realismo de fruaj prozaĵoj. Li oponis kontraŭ ankaŭ imita verkado kaj akcentis, ke oni nepre devas “verŝi sian koron” kaj “elimini ĉiujn ŝablonajn frazojn”. Danke lian penadon, reviviĝis la ĉina prozo.

Han Yu estis pensulo, sekve liaj prozaĵoj estis plenaj de profunda rezonado kaj multe inspiris la legantojn. Li verkis la prozon “Pri Ĉevalo” por metafore admoni, ke prudentaj regantoj ĝustatempe trovu kaj servigu talentulojn, same kiel Bo Le tre sperta en elektado de ĉevalo. Li skribis en sia prozo:

“En la mondo aperis unue Bo Le kaj poste mil-liaj ĉevaloj (unu li-o=0.5 km). Mil-liaj ĉevaloj estas ofte troveblaj, dum Bo Le ne. Tial bonaj ĉevaloj nur subiĝas al sklavoj kaj mortas ĉe stalo en premateco, same kiel ordinaraj ĉevaloj, ne ricevinte la titolon mil-lia ĉevalo.

“La ĉevalo, kiu kapablas kuri mil liojn en unu tago, ĉiufoje povas manĝi barelon da greno, sed la bredisto nutras ĝin kiel ordinaran ĉevalon, ne sciante, ke ĝi kapablas kuri mil liojn en unu tago. La ĉe-

valo, kiu kapablas kuri mil liojn en unu tago, tamen ne povas ricevi sufiĉan nutraĵon nek havas sufiĉan forton, do ĝi ne povas montri sian talenton, kaj eĉ ne povas bone kuri kiel ordinaraj ĉevaloj. Do kiel esperi, ke ĝi kuros mil liojn en unu tago?!”

“Vipi la ĉevalon sed ne laŭ bezono, brede ĝin sed ne sufiĉe disvolvi ĝian kapablon, aŭskulti ĝian henadon sed ne kompreni ĝin, tamen la bredisto diris kun la vipo antaŭ ĝi: ‘Ne troviĝas mil-lia ĉevalo en la mondo.’ Ho ve, ĉu vere ne troviĝas mil-lia ĉevalo? Fakte, li ne konas la mil-lian ĉevalon!”

La tuta teksto havas malpli ol 200 ideogramojn, sed rezonado estas konvinka. La aŭtoro celis “talentulon”, sed nenie en la teksto li uzis la vorton “talento”, kaj rezonadis ekskluzive pri “mil-lia ĉevalo”.

Ankaŭ Liu Zongyuan, samtempulo de Han Yu, estis majstro de poemo kaj prozo. Priskribado en liaj prozaĵoj estis tre delikata. Lia observado estis tre serioza, tial li povis rimarki kion aliaj ne povis, kaj priskribi la vidaĵon, kiun aliaj ne kapablis. La legantoj trovis grandan intereson en liaj prozaĵoj. Li ekskursis ĉe rivereto en la profundo de bambuaro. Tie kuŝis klara baseno kun ŝtona fundo. Li tre ŝatis fiŝetojn en la baseno kaj atente observis. Poste, li skribis: “En la baseno ĉ. cento da fiŝoj naĝas kvazaŭ en aero, sen ajna apogo. La suno penetras ĝis la fundo, kaj la fiŝoj donas sian ombron sur ŝtonoj. Ili jen tenas sin senmovaj, jen pafiĝas malproksimen. Ili naĝadas tien kaj reen, kvazaŭ distrante sin kun preterpasantoj.”

Legante tiun paragrafon, mi kvazaŭ venis al la loko, vidis la fiŝojn jen naĝantaj jen ripozantaj. Kiel bela vidaĵo! La aŭtoro spegulis la belecon de la naturo kaj ankaŭ la harmonion de la homaro kaj la naturo.

Por ke la verkoj estu distingigaj, kutime la antikvaj prozistoj de Ĉinio akcentis implicon kaj penis kaŝi sian ideon en la teksto. Ili

opiniis, ke rekta esprimo estas sen-gusta. Filozofo Zhou Dunyi, kiu vivis en la 11-a jarcento, ege ŝatis lotuson. Li verkis la prozaĵon “Ŝato de Lotuso”. Ĝi legiĝas jene:

“Ŝatindaj floroj de vegetaloj sur tero kaj en akvo estas tre abundaj. Tao Yuanming (365-427), ĉina poeto, ekskluzive ŝatis krizantemon, la publiko ĝenerale ŝatas peonion kaj mi ŝatas sole lotuson, kiu tenas sin pura malgraŭ ke ĝi elkreskas el ŝlimo. Ĝi havas rektan kavan tigon kun neniu ĉiro nek branĉo. Kun delikata aromo lotuso svelte staras gardante sian purecon. Oni devas ĝui ĝin de malproksime, sed ne tuj apude. Mi opinias, ke inter la floroj krizantemo estas ermito, peonio nobelo kaj lotuso virtulo. Ho, mi ne aŭdis, kiu ekskluzive ŝatas krizantemon kiel Tao Yuanming, nek scias, kiu ŝatas lotuson kiel mi. Kaj peonio gajnas ŝaton de la publiko.”

La aŭtoro prikantis lotuson per simbolo. Fakte, li komparis lotuson kun si mem por implice esprimi sian internan mondon kaj laŭdi la noblan spiriton de homo, kiu ĉiam tenas sian honestecon. Evidente, la aŭtoro bedaŭris la kadukiĝon de la moralo de la socio: malmultaj homoj ŝatas krizantemon kaj lotuson, kaj ĉiuj aliaj montras sian ŝaton al peonio. Peonio estas belega kaj simbolo de riĉeco kaj nobeleco. La publiko ŝatas peonion, tio aludas, ke ĉie en la mondo estas homoj ĉasantaj riĉecon kaj nobelecon, kaj por tiu celo ili alprenas ĉiajn manierojn, kaj tio neeviteble korodas la moralon de la socio. La aŭtoro ne rekte esprimis sian maltrankvilon, sed oni povas senti tion en liaj frazoj.

En la postaj centoj da jaroj la prozistoj riĉe rikoltis en sia verkado kaj prozo retrovis sian lokon en la historio de la ĉina literaturo. Ju pli la ĉina prozo proksimiĝis al la moderna tempo, des pli ĝi evoluis al la pure literatura prozo. Post la Novkultura Movado de Ĉinio en 1919 la moderna prozo disigis de la antikva stilo. ■

MAKSIMOJ DE WEI ZHENG POR ŜTATREGADO

Wei Zheng (580-643) estis fama politikisto, kiu ofte admonis imperiestron Li Shimin pro liaj eraĵoj, kaj tiu lasta prenis liajn admonojn kiel maksimumojn kaj skribis ilin sur la ornaman ekranon de sia dormoĉambro.

Kiu esperas sanan kreskon de arbo, firmigu ĝian radikon; kiu esperas senĉesan fluon, dragu la fonton; kiu esperas pacon de la ŝtato, faru bonojn. Sen profunda fonto akvo ne fluas malproksimen; sen firma radiko arbo ne sane kreskas. Ĉu homo kun malmulte da bonoj ne estas tia, kiu hakas la

radikon sed esperas prosperon de la arbo, kaj kiu ŝtopas la fonton sed esperas senĉesan fluon?

Prepariĝu por forigi eblan danĝeron, vivante en paco,

Detenu vin de lukso kaj vivu en mallukso.

Modesteco profitas, fiereco damaĝas.

Estu singardema en la fino, kiel en la komenco.

Homo malhonesto ne sukcesas en la socio.

MEM PROUVU

Odoro-terapio

Efiko de odoro-terapio estis konfirmita en praktiko. Aromo povas influ la homan fizikan kaj psikan staton kaj iuj odoroj povas funkcii kiel medikamento. La aromo de siringo kaj jasmeno refreŝigas kaj trankviligas la homojn. Tiu de violo kaj rozo estas vigliga kaj tiu de narciso faras la homan temperamenton milda.

Aliaj uzadoj de bovlakto

Bovlakto estas nutroriĉa trinkaĵo. Kaj krome, ĝi havas ankaŭ aliajn funkciojn: Matene, post ellitiĝo, se viaj palpebroj ŝveliĝis, vi do povas miksi bovlakton kun vinagro kaj akvo, trempi steatolizitan vaton en la miksaĵo kaj per la vato froti viajn palpebrojn 3-5 minutojn. Poste fomentu ilin per varma lavtuko por momento. Tiamaniere la ŝveligintaj palpebroj normaligiĝas.

Antaŭ frito trempu la fiŝon en bovlakto por kelkaj minutoj, kio povas forigi la mal-

bonan fiŝodoron.

Se en la bovlakto aperis sedimento, vi povas aldoni malgrandan kvanton da akvo kaj per la miksaĵo sterki florojn. Tio estas utila al kresko de floroj.

Taŭgaj horoj por sanigado

Prave diras ĉina proverbo:

“Post ĉiu manĝo promenu cent paŝojn,
Vi vivos sane naŭdek naŭ jarojn.”

La plej taŭga tempo por promenado estas je 45 minutoj post la manĝado. Estas tre bone, se vi tiam promenas 20 minutojn je la rapideco de 4.8 km./horo. Se vi promenos aliajn 20 minutojn 2 aŭ 3 horojn post la manĝado, vi do fariĝos malpli korpulenta.

La plej taŭgaj horoj por la fizikaj ekzercoj estas: En la unuaj du monatoj de vintro kaj printempo — post la sunleviĝo, t.e. post la 7-a horo. En somero kaj aŭtuno — je la 5-a kaj 6-a matene, ĉar tiam la temperaturo estas malvarmeta kaj la aero freŝa. En aliaj sezonoj — je la 10-a matene kaj je la 3-a posttagmeze.

POR VIA SANO

Kiel forigi laciĝon pro televidado?

Longa televidado kaŭzas kapturton, okuldoloron kaj malbonfarton en la nuko, dorso kaj lumboj. Jenaj ekzercoj povas mildigi aŭ forigi la suprajn simptomojn.

OKULFROTADO. Fermu la okulojn. Delikate premu la okulglobojn per la montraĵ fingroj kaj faru frotadon dekstrume kaj livume po 30-40 fojojn.

HARKOMBADO. Kombu la harojn de la frunto ĝis la okcipito per la fingroj 10 fojojn por eksciti la kaphaŭton.

KAPBALANCADO. Levu kaj mallevu la kapon 10 fojojn.

KOLTURNADO. Malrapide turnu la kapon dekstren kaj maldekstren por movi la kolon.

BRACKETENDO KAJ MANKLAKIGO. Levu la brakojn antaŭen, kunigu ilin kaj klakigu la manojn. Mallevu la brakojn kaj reprenu la originan teniĝon. Tion faru 10 fojojn.

ELSTARIGO DE LA BRUSTO KAJ FLEKSO DE LA TALIO. Enspiru profunde, elstarigu la bruston. Elspiru kaj fleksu vin antaŭen. Tion faru 10 fojojn.

MANSVINGADO. Mallevu la manojn kaj svingu ilin antaŭen kaj malantaŭen 10 fojojn.

GAMBOBATADO. Duonpugnigu la manojn kaj per ili batetu la gambojn de la ingvenoj ĝis la ekstera parto de la genuoj. Tion faru 10 fojojn.

LUMBOFROTADO. Pugnigu la manojn kaj per ili frotu la dorson 10 fojojn.

Vi povas fari la supre diritajn ekzercojn post televidado,

kaj ankaŭ fari ilin dum televidado. Pli bone vi faru ilin laŭ la ordo. Komprenible, vi povas fari nur kelkajn el ili.

Por memkuraci la piedtordiĝon

Tordinte la piedon, vi povas konsulti kuraciston, kaj ankaŭ fari simplan memkuracadon, t.e. fomentadon aŭ fridan kompresadon. Fomentado kaj masaĝo de vundita korp parto dilatas angiojn kaj rapidigas sangocirkuladon. Tamen la troa masaĝo kaj trofrua fomentado povas gravigi la sangadon kaj eksudon de organika likvaĵo. Tiam se vi aplikas fridan kompresadon, tio povas maldilati la angiojn kaj malakceli la sangocirkuladon, tiel ke ĉesas hemoragio, malpliigigas eksudado kaj kvietigas la doloro.

Pli bone vi faru fridan kompresadon tuj post piedtordiĝo. Se vi volas froti la vunditan parton, vi devas fari tion delikate, sed neniel tro forte. Post 24 horoj, kiam ĉesas sangado, vi povas fari fomentadon aŭ masaĝon por dilati la angiojn de la korp parto kaj akceli la sangocirkuladon, kio utilas al asimilo de la eksudintaj sango kaj organika likvaĵo, plibonigo de la nutroprovizo kaj resaniĝo de la lezitaĵ histoj. Tiam venas malŝveliĝo, seninflamiĝo kaj sendoloriĝo.

Kontraŭ surokramfo

La gravedulinoj, precipe la virinoj gravedaj je pli ol 5 monatoj, iafoje suferas de surokramfo pro manko de kalcio en sango. Tiam ili devas forte pinĉi la filtrumon 20-30 sekundojn per la dika kaj montra fingroj, kaj la kramfo mildiĝas. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Esperanta Sekcio de Societo por Japana-Ĉina Amikeco per Korespondado (SJĈAK) fondita en 1979 varbas por siaj anoj seriozajn korespondantojn nur el Ĉinio. Indikante preferatajn temojn, vian agon, sekson ktp., skribu al: Esperanto SJĈAK, Mogusa Danti 154-1004, Hino-si, Tokyo, 191 Japanio.

* Thierry Cortinovis, 26-j., dez. kor. kun ĉinoj en Esperanto. Adr.: Eisengasse 19, CH-2502 Bielo, Svislando.

* Anna Chmielowiec, 58-j. kaj bonkora esp-istino serĉas geedziĝcele la saman esp-iston. Adr.: Drewnowska 182/6, 91-085 Łodz, Pollando.

* Francis M. Onyeneke, 20-j. studento, dez. kor. kun esp-istoj el ĉiuj landoj. Adr.: P.O. Box 216, Bauchi, Nigero.

* Andaluzia Esperanto-Unuiĝo dez. interŝanĝi uzitajn hispanajn pm. kontraŭ uzitaj pm. el ajna lando. Adr.: Poŝtkesto 864, E-29080 Malaga, Hispanio.

* Lü Zhonghong dez. kor. pri komerco, komputilo, turismo ktp. Adr.: 29-2, Bei Da Xi Jie, Zhifuqu, Yantai, Shandong, Ĉinio.

* Lech Grochulski, 45-j. s-ro, dez. kor. kaj ligi interparolon kun geamikoj el aliaj landoj. Adr.: ul. Zarecka 54/155, 42-206 Czestochowa, Pollando.

* Masud Gudarzy, 25-j. oficisto, dez. kor. pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bk. pri la naturo kaj monumentoj. Adr.: No. 38, Sh. Maleki Lane, Siavosh Str., Azadi Ave., IR-69188 Borujerd, Irano.

* Bahram Karimzadeh, 17-j. studento, dez. kor. pri ĉiuj temoj, precipe pri sporto kaj interŝanĝi bk. kaj pm. Adr.: NO. 52, Golestan Lane, Ayatullah Kashani Ave., IR-69166 Borujerd, Irano.

Plano por sano de la civitanoj



Longdistanca kuro en Pekino

“**A**KVO fluanta neniam putras, kaj pordakso neniam estas mordita de vermoj,” per la metaforo antikvaj ĉinoj montris, ke io ofte moviĝanta estas malfacile korodita, kaj la modernuloj diras: “La vivo dependas de sportado.”

Ĉinoj multe profitis de sanigaj spertoj de antikvuloj. En la lastaj jaroj oni propagandis sporton konkursojn multe pli ol la popularan, kaj plie, ĉiutage multaj estis tro okupitaj ne havante tempon por sportado.

En 1993 la enketo pri laboristoj kaj oficistoj de 100 grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de Ĉinio montris, ke 19.4% de ili neniam ekzercis la korpon,

nur 10.4% de ili faris tion. Komence de 1994, la enketo pri amuzado far pekinoj montris, ke ĉie estas sportaj amatoroj en vortoj, tamen nur 19.6% de la pekinoj ofte faris sanigajn ekzercojn.

Manko de sportaj ekzercoj kaj ŝarĝo de laboro donas teruran sekvon. Laŭ statistiko, en la jaroj 1988-1992 en Ĉinio la mortokvanto de mezaĝaj intelektuloj estis trioble pli granda ol tiu de maljunaj. Medicinaj fakuloj atentigis, ke la aĝo, en kiu oni suferas de cerbangia afekcio, pli-malpli malgrandiĝas.

La homaro havas la komunan deziron havi bonfarton kaj longan vivon. Por realigi la deziron oni devas plibonigi laborkondiĉojn, redukti vivŝarĝon



Korpo-ekzercado en laborpaŭzo

kaj persiste ekzerci la korpon. Por tio la Nacia Fizik-kultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio pretas ellabori en la nuna jaro la "Planon por sano de la civitanoj".

La plano estos praktikata, gvidate de la ŝtato, apogate de la socio kaj partoprenate de la tuta popolo, kun celo, tasko kaj rimedoj. Ĝi baziĝos sur riĉigo de la vivo de la popolo.

La plano devas esti scienca, racia, praktikebla kaj facile kontrolata. Ĝi devas esti perfektigata paŝo post paŝo. Estas malfacile disvastigi la planon en la kamparo, tamen necesas ĝin praktiki same kiel en la urboj.

Por kolekti opiniojn pri la plano, la komisiono faris enketon inter sportaj laborantoj kaj medicinaj fakuloj de 27 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. 95.5% de ili enlistigis la neceson praktiki la planon. Ili montris, ke nuntempe la amasa sporto kaj la sanstato de la popolo ne estas kontentigaj, sportaj instalaĵoj terure mankas kaj ĉiam pli malmultiĝas sportaj ekzercantoj. Laŭ ili, la sanstato de la popolo certe malboniĝos.

Plejparto de la prienketitoj havas plenan fidon al la praktiko de la plano. Ili opinias, ke post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 estis metita bona bazo por la amasa sporto de Ĉinio, iom post iom perfektigis la teoria kaj administra sistemo de sporto kaj aperis sporta kaj konvaleska merkato. La disvolviĝanta merkata ekonomio kreis bonan medion por la naskiĝo de la plano.

20.8% de la prienketitoj dubis pri la praktikebleco de la plano. Jen la kialoj: iuj ne konsentas la enhavon de la plano; iuj ekonomie postĝintaj regionoj, pre-

cipe iuj malriĉaj vilaĝoj en la kamparo, ankoraŭ ne posedas kondiĉojn por fari sporton; iuj timas, ke lokaj sportaj fakuloj, kie ankoraŭ ludas gravan rolon la malnova sistemo, kaj la neperfektiĝo de la leĝa sistemo malhelpos la disvastigon de la plano.

Ĉiuj tiuj problemoj estas solvendaj en la praktiko.

Nuntempe, koncerna departemento jam zorgas pri la kultur-sporta vivo en semajnofino. Unu ekzemplo estis la sistemo de 44-hora laboro en semajno komenca marte de 1994. Tio donis tempon kaj spacon por havigi civilizitan vivmanieron.

Nun en la socio mankas postlaboraj sportoj, ekskluzive de kartludo kaj vizito de balo aŭ karaokejo. En la vasta oficistaro la tenisludo, golfoludo kaj kegloludo ankoraŭ ne estas popularaj. Pro tio necesas sin amuzi per ekskurso, kureto, bicikla vojaĝo, tendumo ktp.

Oni devas kolekti en la socio homfortojn, monrimedojn kaj materialojn bezonatajn por la plano. Ekz., starigi sportan fonduson, emisii sportajn biletojn de premio kaj kolekti monon diversmaniere en la socio. Samtempe necesas kuraĝigi popolanojn racie investi por sia sano, plifortigi la konscion "pagi por la sano". Se nur la ŝtato, socio kaj individuo kunlaboros harmonie, la plano por sano de la civitanoj efektiviĝos bone.

La unuaperioda laboro de la plano finiĝos antaŭ la jaro 2000.

La celo de la plano por sano de la civitanoj estas, ke la skalo de sporta disvolviĝo kaj la sanstato de ĉinoj preskaŭ atingos aŭ tute atingos tiujn de la evoluintaj landoj. ■

EKONOMIO

● En la lastaj jaroj Tibeto larĝe malfermis sian pordon en ekonomio. Sole en 1993 ĝi aprobis 40 novajn projektojn rilatajn al internaj kaj eksteraj entreprenoj. La valoro de ĝia ekstera komerco atingis 100 milionojn da usonaj dolaroj.

● Antaŭ nelonge simpla ŝoseo etendiĝis ĝis Medo-gubernio de Linzhi(Linĝi)-regiono, Tibeto, tiel ĉiuj gubernioj de Ĉinio estas atingeblaj per ŝoseo.

La nomita ŝoseo, 141 kilometrojn longa, troviĝas en okagrada sisma zono en sudorienta Tibeto, kie ofte okazas lavango, kot-ŝtona fluo, ter-ŝoviĝo kaj monto-disfalo pro komplikaj kondiĉoj geografiaj, topografiaj, geologiaj kaj hidrologiaj. Tio kaŭzis multajn malfacilojn al la konstruado de la ŝoseo. Oni sukcesis konstrui ĝin en dek jaroj.



Oficisto en arboplantado

● De post 1981, kiam la ĉina registaro ellaboris leĝon pri deviga arboplantado de civitanoj, ĉiujare 200 milionoj da homoj partoprenis en arboplantado. En la pasintaj 13 jaroj ĉinoj plantis entute 18 miliardojn da arboj. Nun la provincoj Guangdong, Fujian (Fuĝjan) kaj Hunan jam verdigis siajn kalvajn montojn.

● Lastatempe oni trovis grandegan subteran lagon en la baseno de Shaanxi (Ŝenŝji), Gansu kaj Ningxia (Ningŝja) en nordokcidenta Ĉinio. La lago rezervas ĉ. 11 400 miliardojn da kubmetroj da akvo, inkl. 6 960 miliardojn da kubmetroj da dolĉa akvo, 267.7-oble kiom la plej granda ĉina dolĉakva lago Poyang.

● La pekina magistrato planis konstrui, inter 1994 kaj 1997, loĝdomojn kun plank-areo de ses milionoj da kvadrataj metroj, por ke la pokapa plank-areo atingu 14 kvadratajn metrojn.

En la pasintaj 15 jaroj de 1978 ĝis 1993 oni starigis en Pekino loĝdomojn kun plank-areo de 80 milionoj da kvadrataj metroj, tiel ke la pokapa loĝ-areo kreskis de 4.55 kvadrataj metroj en 1978 al 8.3 kvadrataj metroj nun.

● En 1993 la ĉina delegacio de la intertraktado pri restarigo de la pozicio de Ĉinio kiel lando subskribinta la Ĝeneralan Konvencion pri Tarifoj kaj Komerco trifoje ĉeestis la kunvenon de ĉina labor-grupo en Ĝenevo kaj faris duflankan diskuton kun subskribintoj Usono, Japanio, la Eŭropa Komunumo kaj Kanado. Nun iuj landoj jam komencis la intertraktadon kun Ĉinio pri reduktado de doganpagoj aŭ estas pretaj komenci tian intertraktadon. Ĉinio partoprenis en la foj-refoja intertraktado en Urugvajo kaj laŭ ĝia tagordo prezentis tarifojn pri reduktado de doganpagoj por agrikulturaj kaj neagrikulturaj produktaĵoj. La ĉina delegacio trifoje flugis al Ĝenevo por

Loĝkvartalo en konstruado



intertrakti kun dekelkaj subskribintoj pri reciproka malfermo de servo-merkato, surbaze de tio prezentis unuapaŝan skriban promeson pri serva komerco kaj faris kontribuon por akceli la intertraktadon en Urugvajo.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Lastatempe inaŭguriĝis en la urbo Xiamen (Ŝjamen), Fujian-provinco, novtipa astronaŭtika telemetria stacio de Ĉinio. Kiel moderna sinteza telemetria stacio kun ĉiaj funkcioj de Ĉinio, ĝi povas ne nur kontentigi la bezonon telemetri sateliton en meza aŭ malalta orbito, sed ankaŭ plenumi la taskon telemetri sateliton en orbito sinkrona kun la terглоbo aŭ la suno, kontroli sateliton en orbito kaj servi per telemetrado por astronaŭtika komerca lanĉo.

- Je la 5-a de majo 1993 estis stranga sabloŝtorma vetero en la urbo Jinchang (Ĝinĉang), Gansu-provinco, nordokcidenta Ĉinio: fungforma nubo, flava supre, ruĝa meze kaj nigra malsupre, altis mil metrojn kaj surdiga tondro daŭris pli ol 20 minutojn.

Ĉinaj meteologoj konstatis post esplorado, ke la sablan ŝtormon kaŭzis grandega rapideco de la vento, altega leviĝo de la polvo kaj refrakto de sunradioj far polvoj en malsamaj altoj, kaj la senĉesan tondradon kaŭzis senpluviga tondroŝtormo.

- Lastatempe la Centro de Elterigitaj Antikvaj Objektoj de Hukuoka, Japanio, konstatis post ekspertizo per moderna scienca metodo, ke la enteno de oro de iu ĉina ora stampilo el la Orienta Han-dinastio (25-220) estas 95.1%. Tio pruvis, ke jam antaŭ 1 900 jaroj Ĉinio havis sufiĉe altan nivelon en afinacio de oro. La ora stampilo, elterigita en Japanio en 1784, estis donacita de ĉina imperiestro de la dinastio al la tiama estro de regno sur Hukuoka-ebenaĵo.

SPORTO

- Por levi la piedpilkan nivelon de Ĉinio, la Internacia Piedpilka Federacio okazigis plurfoje en la pasintaj jaroj kursojn de diversaj tipoj en diversaj lokoj de Ĉinio. Oktobre ĉi-jare, la federacio aranĝos en Brazilo kurson de altnivelaj trejnistoj por trejni 15 ĉinajn trejnistojn.

ARKEOLOGIO

- Oni malkovris ruinon de primitiva vilaĝo, kiu ekzistis antaŭ 8 000 jaroj, en la vilaĝo Xinglongwa (Ŝinglongŭa) de la Interna Mongolio, norda Ĉinio. Post ses grandskalaj prifosadoj de ĉinaj

arkeologoj en 11 jaroj, tute malkovriĝis restaĵoj de ĉirkaŭvilaĝa kanalo, dombazoj, cindrokavoj kaj tomboj, kun totala areo de pli ol 30 000 kvadrataj metroj. Ĝi estas ruino de la plej frua kaj plej kompleta ĉina prahistoria vilaĝo. La arkeologoj nomas eltrovaĵojn Xinglongwa-kulturo. Fakuloj diris, ke la malkovro estas granda atingo de la prahistoria arkeologio de Ĉinio.

- En la pasintaj jaroj Tan Yuanyuan, lernantino de la Ŝanhaja Danca Lernejo, gajnis sinsekve la unuan premion de la geknaba klasik-baleta grupo en la Kvina Pariza Internacia Konkurso de Danco, la orajn premiojn de la knabina grupo de la Unua Japana Internacia Konkurso de Baleto kaj Moderna Baleto kaj Nijinsky-premion de Pollando. Ŝi estas rigardata de mondaj dancistoj kiel esperoplena talentulino.

- Junie de 1995 oni emisios poŝtmarkoserion desegnitane de pentristo s-ro Ding Shaoguang, ĉina elmigrinto en Usono, omaĝe al la 50-jariĝo de UN.

La poŝtmarkoj kun Ĉinio, Hindio, Egiptio, Grekio, Ameriko kaj Afriko respektive kiel sia fono temas pri libero kaj feliĉo, paco kaj religio, patrineco kaj amo, laboro kaj kreo, kulturo kaj eduko, kaj sporto kaj sano. Ili estos presitaj en Ĉinio.

- En la daŭro de duonjaro s-ro Yang Wenhua, artisto pri miniatura gravurado de Ŝanhajo, gravuris 300 poemojn de Tang-dinastio (618-907) en skribmaniero cirkulanta en Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.) sur 5-centimetre longa ebura ventumilo.

Antaŭe li faris ventumilon, la plej malgrandan en la mondo. Ĉiu ĝia ripo havas longecon de nur 2.2 milimetroj. Malfermita, ĝi estas granda kiel rizgrajno. Kaj sur ĝi li gravuris pli ol 30 poemojn el 4 000 ideogramoj en moderna ĉina skribmaniero. La ventumilo pezas nur 0.035 gramon.

TURISMO

- Dekkelkaj vilaĝoj dissemataj ĉe la rivero Nanxi (Nanŝji) de Yongjia (Jongĝja)-gubernio, Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco, estas kiel natura muzeo. Tie la digo, kanaloj, muroj, dombazoj, kortomuroj, peronoj, vojoj k.a. estas faritaj el rulŝtonoj. La antikva ŝtona kulturo ravas turistojn. En iuj vilaĝoj troviĝas eĉ kioskoj, scenejoj, temploj kaj aliaj konstruoj starigitaj antaŭ 800 jaroj.

MEDICINO

- Antaŭ nelonge la Nankina Ĝenerala Hospitalo de Jiangsu (Ĝjansu)-provinco unuafoje sukcesis grefti la maldikan inteston al iu malsanulino.

Ĝenerala Kompanio de entreprenoj

LA nomita kompanio estas ekonomia entrepreno de industrio kaj komerco, kun fiksa kapitalo de 40 milionoj da juanoj kaj cirkula kapitalo de 10 milionoj da juanoj. La kompanio havas 800 laboristojn. Ĝiaj fabrikoj kovras areon de 9 000 kvadrataj metroj kaj la plankareo de ĝiaj hotelo, restoracio kaj ĉiovendejo estas 20 000 kvadrataj metroj.

Al la kompanio apartenas pluraj entreprenoj, kiaj malpezindustria maŝinfabrika, fabriko de glaciaĵoj, fabriko de kartonaj skatoloj, presejo kaj fabriko de normaj pecoj. Ili produktas ĉefe assistajn motorojn de kaldronego, glaciaĵojn, boltojn, boltinĝojn, kartonajn skatolojn, presaĵojn k.a.

Ĉambro de la hotelo



Esperanta ŝildo de la Qingdao-a Esperanto-Ligo, kiu sidas en la hotelo

Wang Zhengqi, ĝenerala direktoro de la kompanio, estas prezidanto de la filio de la Komerca Asocio de Esperanto, Qingdao. Kiel fervora subtenanto de Esp-movado, li faris multan

kontribuon al disvolviĝo de Esp-movado de Qingdao dum pluraj jaroj.

La kompanio varme bonvenigas amikojn ĉinajn kaj alilandajn al Qingdao por kune entrepreni restoracion, trinkejon, turisman servon kaj fabrikon.

Ĝenerala Kompanio de Dahua-entreprenoj, Qingdao

Poŝtkodo: 266042
Adreso: Nanfenglu, N-ro 25,
Qingdao, Ĉinio
Telefono: 4857089
Konektotabulo: 4854811
Telefakso: 4857085

Qingdao-a Esperanto-Ligo kaj Qingdao-a Paca Industria Kompanio

Telefono: (0532) 4854811-222
Telefakso: (0532) 4857085

Dahua-

DAHUA-HOTELO de Qingdao situas en la urbocentro de Qingdao, kun facila trafiko kaj avangardaj instalaĵoj. Ĝiaj ĉambroj estas instalitaj per kolora televidilo, ferm-cirkvita televidilo kaj plurfunkcia telefono. En la hotelo servas komerca centro, bileto, taksoj, kafejo, bilardejo k.a., kunvenejoj kun 40-400 sidlokoj kaj parko por 50 aŭtoj.

En la hotelo laboras restoracio, kiu povas samtempe akcepti 500 klientojn, kaj dekelkaj delikataj kaj komfortaj festenejoj, kiuj liveras al gastoj abundajn bongustajn manĝaĵojn.

La luksa kaj eleganta dancejo, karaokejo, unuaranga sonradiada aparato atendas vian belan kantadon kaj dancadon.

La Qingdao-a Esperanto-Ligo kaj ĝia ekonomia entrepreno Qingdao-a Paca Industria Kompanio, la Esperantista Centro de Qingdao kaj la Qingdao-a Informejo sub la redakcio de "El Popola Ĉinio" havas sian sidejon en la hotelo.

Ni varme bonvenigas la tutmondajn esperantistojn al Dahua-hotelo por kune kun la ĉinaj samideanoj fari akademian, kulturen, turisman kaj komercan interŝanĝojn por disvolvi Espermovadon.

Dahua-hotelo de Qingdao

Adreso: Changshalu, N-ro 111, Qingdao, Ĉinio

Poŝtkodo: 266042

Telefono: (0532) 4854811

Telefakso: (0532) 4857085

Telegramo: 3162



S-ro Wang Zhengqi



Vestiblo de Dahua-hotelo

Restoracio de la hotelo





Dahua-hotelo en noktko

ISSN 0032-4361



9 770032 436009



世界语《中国报道》一九九四年第七期
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339 / G2